

# *Etnismo*

ISSNO93

N-ro 92

INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

31.12.2013

## *Ĉu Skotlando estu sendependa?*



## EN TIU ĈI NUMERO:

- *Eldonista bileto*  
p. 3
- *Skotlando: La vojo reen al sendependiĝo*  
p. 4 - 7
- *Valencilando restas sen kataluna televido*  
p. 8 - 10
- *Baleara Revolucio*  
p. 11
- *Artistoj subtenas ciganojn*  
p. 12 - 14
- *Laŭzananoj manifestacias por la tago de la romaoj*  
p. 15 - 17
- *La arborejoj: dua parto, la diasporo*  
p. 18 - 20
- *Recenzo: Patric, okcitana kantisto*  
p. 21
- *Koncize el ...*  
p. 22
- *IKEL-informilo no 72*  
p. 23

### foto:

La skota parlamentejo vidita el *Salisbury Crags*.  
El Vikimedio.

### Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kajerojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero (de simpla numero kostas 5 € (inkluzive de la franko). La artikoloj publicitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la **IKEL-Informilo** estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti kontribuojn.

### ESTRARO:

**PREZIDANTO: Alain FAVRE** (savoĵano),  
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,  
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++ 33 450 94 02 08,  
retadreso: [afavre1@hotmail.com](mailto:afavre1@hotmail.com); [etnistoj@bigfoot.com](mailto:etnistoj@bigfoot.com)  
TTT-ejo: <http://ikel.stel.net>

### VICPREZIDANTO KAJ REDAKTISTO:

**Nicole MARGOT** (vaŭdanino),  
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne  
tel: ++ 41 21 653 14 67, retadreso: [n.margot@bluewin.ch](mailto:n.margot@bluewin.ch)

**SEKRETARIO: Nikolas XIL CARVALHO** (asturleono),  
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH  
tel: ++ 34 630 44 68 63,  
retadreso: [fokomelo.makolji@gmail.com](mailto:fokomelo.makolji@gmail.com)

**KASISTO: Xabier RICO ITURRIOTZ** (eŭsko),  
Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz  
Euskal Herria-Eŭskio  
retadreso: [xabirico@euskalnet.net](mailto:xabirico@euskalnet.net)

### RILATOJ KUN ESPERANTO-GAZETOJ. REVIZIADO:

**István ERTL** (hungaro), 22, rue Faulfiels  
LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,  
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: [istvan.ertl@gmail.com](mailto:istvan.ertl@gmail.com)

### ESTRARANO:

**Hèctor ALÒS I FONT** (kataluno), Mir pr. 15-55, RU-428024  
Ŝupaŝkaro, Ĉuvaŝio-Rusa Federacio  
retadreso: [h.alos@esperanto.cat](mailto:h.alos@esperanto.cat)

### KOTIZOJ KAJ KONTOJ:

| Kotizoj    | eŭroj |
|------------|-------|
| Normala    | 20.00 |
| Subtenanta | 30.00 |
| Rabatita   | 10.00 |

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ "triamonda" lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian **IKEL**-kotizon **ekskluzive** al la konto de **IKEL** ĉe **UEA** (kodo: **ikel-y**) aŭ al unu el jenaj konto de:

### UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam):

- BELGA poŝtĝironto (pĝk) n-ro **000-1631831-97**

- GERMANA (Köln) pĝk n-ro **318291- 509**

BLZ 370 10050 IBAN:

DE51370100500318291509SWIFT PBNKDEFF

- NEDERLANDA pĝk n-ro **37 89 64**

IBAN: NL24PSTB0000378964, SWIFT PSTBNL21

- SVEDA pĝk n-ro **74374-0**

IBAN: SE9595000099604200743740,

SWIFT **NDEASESS**

- SVISA pĝk **12-2310-0** (Bulle)

Ĉiukaze indiku "**ikel-y**" kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi ke via kompleta kotizo alvenu al la **IKEL**-konto: **IKEL** absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!

Eblas reklami en *Etnismo*!

Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6

**Venonta redaktolimdato:**

**31-an de marto 2014**

# ELDONISTA BILETO

## Ĉu etnistoj ĉiam favoras

## kreon de unuopa ŝtato

## por solvi etnajn problemojn?

La publiko tro ofte, eble plej ofte opinias, ke etnistoj principe favoras la kreon de unuopa ŝtato por ĉiu etno. Bone pripensante pri tio, oni facile alvenas al la konkludo, ke tia ideo estus absurdaĵo, pro tre multtipaj kialoj: nevolado de etno mem, intermiksa aŭ diaspora situacio, malgranda nombro de etnanoj... Malgraŭ tio, ke en la mondo, de post la fino de la dua mondmilito, la nombro de ŝtatoj ege pliiĝis, ankaŭ pro etnaj kialoj. Kaj tiuj novaj ŝtatoj ne ĉiam estas sukcesaj: ni pensu nur pri la plej ĵusa, Suda Sudano, kie interna milito nuntempe furiozas specife inter la lokaj etnoj, kun miloj da viktimoj kaj interveno de la blukaskuloj de UN.

Kaj tiu kreado de novaj ŝtatoj povus daŭri. En la jaro 2014 skotoj decidis, ĉu ili disiĝos de Britio. Ĉu tio gravos laŭ etna vidpunkto? Mi respondus jes kaj ne. Unuflanke, etnaj rajtoj estas jam bone certigitaj en la nuna Skotlando: oni subtenas la gaelan, eĉ la ĝermanan skotan, multaj lokaj uzoj kaj tradicioj estas respektataj. Sed kompreneble ĉiam ekzistas la risko, ke la londona registaro fariĝos pli prema, eĉ reduktos la kompetentojn de la skotaj parlamento kaj registaro, profitante ekzemple de ia krizo. Ĉar la historio montras, ke malantaŭeniro pro perdo de kolektivaj rajtoj ne estas malofta fenomeno.

Tio kondukas nin al alia eŭropa situacio, kie ĝuste tiu fenomeno okazas. Ankaŭ en Katalunio, pli precize en la Aŭtonoma Komunumo, la loĝantoj voĉdonos por decidi pri la plua aparteno al la hispania ŝtato, sed en tiu kazo kontraŭ la volo de la ŝtata registaro mem. Ĉu la etna karaktero de la barcelona Katalunio – interalie kataluna kaj okcitana – ion gajnos, se dispartigo de Hispanio okazus? Tute certe jes. Ĉu la hispanparolantoj riskus esti diskriminaciataj? Verŝajne ne. Sed alitipa problemo okazus: la hispania ŝtato fariĝus pli “kastilia”, aliaj katalunoj – ĉefe balearanoj kaj valencianoj – ege suferus pro tio, kaj ankaŭ aliaj minoritatoj. Eble, eĉ verŝajne tio kondukus ne nur al frakasiĝo de la hispania ŝtato – kio en si mem objektive ne estas malbono – sed ankaŭ al “interna” milito, kio ŝajnas nemalofta plago en la hispania historio. Kompreneble tio tute ne signifas, ke mi persone kontraŭas al sendependiĝo de Katalunio – se mi estus kataluno, mi tute certe fervorege aprobus tiun ideon; mi nur provas pensi pri la konsekvencoj, interalie etnorilataj, de tia procezo.

La kebekia situacio estas iom parenca, kvankam malpli akra. Ne delonge la “suverenistoj” rekaptis la povon en tiu kanada provinco plejmulte franclingva, kaj denove la ideo pri sendependeco fariĝas aktuala. Kompreneble ties efektivigo pli bone certigus la etnajn rajtojn de la franclingvanoj kebekiaj. Tamen por la samlingvanoj, kiuj vivas en aliaj kanadaj provincoj, la bato riskus esti sufiĉe terura, ili ja perdus gravan subtenon – eĉ se ili mem ofte kritikis la kebekian superregon kulturen. Ankaŭ Kanado ege perdus el sia bunteco, ĝi riskus fariĝi nura usona apendico. Kaj ĉu kebekiaj indianoj havus pli da rajtoj? Mi vere timas, ke tute ne.

Konklude sendependeco de Kebekio ŝajnas al mi nedezirinda, ankaŭ se ne ĉefe pro etnaj starpunktoj, sed mi kompreneble akceptas aŭskulti kontraŭan opinion.

Ni do vidas, ke kreo de ŝtatnacio ne estas nepre solvo de etnaj problemoj, ĝi eĉ tre ofte povas krei aliajn. Tio ne malhelpas, ke ŝtatoj prave kreiĝas aŭ malaperas sur tiaj bazoj, kaj malmultaj nuntempe bedaŭras la iamajn Ĉeĥoslovakion, Jugoslavion... Sed entute kaj eble plej ofte etnaj liberecoj povas esti defendataj per respekto de internaciaj konvencioj, ĉartoj, kiuj subtenas la malplimultojn. Ni do respektu la ŝtatojn, kiuj tiel sin devontigas, inkluzive pri la rajto por ĉiu popolo disponi pri si mem – eĉ se la naciŝtato, inventita en Eŭropo dum la dekaŭa jarcento, tute certe fariĝos malpli kaj malpli aktuala, profite kaj al pli grandaj kaj al pli malgrandaj strukturoj.

Kaj fine notu, ke pluraj situacioj aluditaj en ĉi tiu bileto estas traktataj en tiu ĉi numero de *Etnismo*, pri kiu mi deziras al vi bonan kaj profitorican legadon.

*Alain Favre*

# SKOTLANDO:

## *La vojo reen al sendependiĝo*



Vikimedia, 2006. Aŭtoro: Deacon of Pndapetzim.

**Fragmento de pikta ŝtono, nomita ŝtono *Daniel* kaj trovita en *Rosemarkie*.**

**L**a 18an de septembro 2014 okazos referendumo en Skotlando pri la estonteco de ĉi tiu antikva lando. La demando estos “Ĉu Skotlando estu sendependa lando?”, anglalingve “*Should Scotland be an independent country?*”, kun la ebloj fari krucon jese aŭ nee. Ne estos aliaj vortumadoj en la aliaj lingvoj, sed ja estas oficialaj informoj en aliaj lingvoj. Propagando krom en la angla haveblas de la JES-flanko minimume en la skotgaela, la pola, la pangaba, la urdua kaj la franca. Mi ne povis trovi propagandon de la NE-flanko en alia lingvo krom la angla. Ni revenos poste al la demando per kio la estonteco regalos la loĝantojn de Skotlando kaze de JES kaj kaze de NE, sed unue ni esploru kiel Skotlando fariĝis Skotlando, kial ĝi perdis sian sendependecon, kaj kial dum lastaj jaroj la ideo de sendependiĝo tiel forte repopulariĝis.


### LA UNUIĜO DE SKOTLANDO

Skotoj povas fieri pri la fakto ke same kiel Germanio, ili sukcese rezistis la provojn de la romianoj konkeri la landon. Same kiel la germana *Hermann* (Arminio esperante), la skotoj havis simile sukcesan nacian heroon de tiu epoko, *Kalgakos* (Kalgako). Laŭ la romia verkisto Tacito, Kalgako denunciis la romianojn jene: “al rabado, mortigado, ŝtelado ili donas la mensogan nomon imperio; ili faras dezerton kaj nomas ĝin paco”. Tiutempe la loĝantoj de Skotlando estis ĉefe keltaj triboj: iuj en la okcidento de la lando, kiujn oni ĝenerale nomas skotoj, parolis


keltan lingvon parencan al la modernaj skotgaela, irlanda kaj manksa; aliaj en la oriento kaj nordo, nomataj Piktoj, kaj Britonoj en la sudoriento, parolis keltajn lingvojn parencajn al la modernaj kimra, bretona kaj kornvala. Pli malfrue formo de norda dialekto de la angla disvastiĝis tra la sudoriento kaj centro de la lando. En la jaro 843 p.K., okazis unuiĝo de la reĝlandoj de la piktoj, kaj oni komencis aludi al la tuta lando kiel Skotlando. La antaŭe piktparolantaj kaj britonparolantaj regionoj de la lando ekparolis aŭ la skotgaelan aŭ, pli malfrue, la skotan lingvon, kiu evoluis el tiuj nordanglaj dialektoj.

### INVADO KAJ REZISTO

Pliposte okazis norvegaj provoj konkeri Skotlandon, sed tio finiĝis post la batalo de *Largs* en 1263 p. K., sed tiam la danĝero venis de la pligrandiĝinta potenco de Anglio de post la normanda konkero de Anglio en 1066. La angla ŝtato jam ĵus sukcesis konkeri Kimrion en 1282, kaj akiri iom da







Vikimedia. Aŭtoro: Finlay McWalter.

### Wallace-monumento apud Stirling.

teritorio en Irlando, en la regiono ĉirkaŭ kio nun estas Dublino, kaj post kelkaj jaroj, tuj kiam Skotlando spertis dinastian krizon en 1296, Anglio lanĉis invadon. Sekvis pli ol 30 jaroj da rezisto, unue en gerila milito sub la gvidado de *William Wallace*, kiu kaptiĝis estis ekzekutita en 1305 kaj poste sub la reĝo *Robert la unua* (de Brus) kaj lia filo *Robert la dua* en pli konvencia milito, kiu finfine renversis la konkeron kaj dum iomete da tempo signifis pacon inter la du landoj. La fino de tiu ĉapitro de skota historio ankaŭ pli-malpli difinis la sudan landlimon de Skotlando en ĝia nuna pozicio. La sola escepto estas la urbo *Berwick*, konkerita milite de Anglio en 1482, kaj ĝis tiam la kvina urbo laŭ grandeco en Skotlando.


### EKONOMIA IMPERIISMO

Malgraŭ la perdo de *Berwick*, kaj la eĉ pli terura malvenko en fiaskinta revenĝprovo ĉe *Flodden* en norda Anglio en 1513, Skotlando travivis plian periodon de sendependeco. Sed temis pri malfacilaj tempoj, kun burĝonantaj imperioj, la leviĝo de ekonomia piratado, kaj religiaj militoj, kaj Skotlando bezonis aliancanojn. Ĝi elektis Francion el la haveblaj superpotencoj de la epoko. Ĉi-foje, Anglio suferis dinastian krizon. Pro la intergeedziĝemo de la regantaj klasoj de Eŭropo, *James* [Jakobo] la sesa de la Skotoj fariĝis *James* la unua de Anglio en 1603. Skotlando retenis sian propran registaron, kaj ekonomie devis konkurenci kontraŭ Anglio. Aliloke aliaj landoj fondis proprajn imperiojn por ekspluati aliajn landojn kaj aliajn popolojn, kaj la skota reganta klaso sentis tiun mankon. Nacia projekto

fondi kolonion apud la nuna Panamo en 1698 entrepreniĝis, en kiu investiĝis kvarono de la mono de la lando. En la unua provo fondi la kolonion, la projekto spertis malfacilaĵojn, kaj la koloniantoj petis helpon de angla kolonio en Jamajko, sed la angla registaro ordonis al ili ne helpi. En dua provo fondi tie kolonion jaron poste la untaj koloniistoj malsaniĝis pro diversaj tropikaj malsanoj kaj estis facile konkeritaj de hispanaj soldatoj. Skotlando estis bankrota. En komerca milito kontraŭ Anglio, Skotlando malgajnis.

### LA TRAKTATO DE UNUIĜO

La reganta klaso de Skotlando vidis tamen oportunojn por si mem, se ili povus alkroĉi sin al la leviĝanta potenco de la angla imperio. La subaĉetado de anoj de la Skota Parlamento, per (laŭvorte!) valizoj da mono de anglaj sekretaj agentoj (modelo poste sekvota de la CIA en Irako kaj aliloke en la moderna epoko) helpis ŝanĝi la opiniojn de ŝanceliĝantaj skotaj parlamentanoj, kaj la 24an de marto 1706 estis subskribita la Traktato de Unuiĝo inter Skotlando kaj Anglio. Kimrio kaj Irlando jam enkorpiĝis en la anglan ŝtaton, ĉu teritorie (en la kazo de Kimrio), ĉu kiel persona posedaĵo de la reĝo (en la kazo de Irlando), sed la



Vikimedia.

### Traktato de la unuiĝo.

Traktato de Unuiĝo estis traktato inter du ŝtatoj, konsistigantaj “Grandan Brition”, kaj ĝi certigis al Skotlando la rajton daŭre havi propran sistemon de krimleĝaro, propran eklezion, kaj do propran edukan sistemon, kaj kompreneble, privilegiojn por la skota reganta klaso.

### KAJ LA SEKVO

Skotlando ne prosperis kiel kolonio de la angla imperio. Jes, individuoj prosperis, precipe anoj de la reganta klaso, kaj tiuj, kiuj pretis servi la imperion eksterlande. En 1707, la jaro kiam la unuiĝo efektiviĝis, la loĝantaro de Skotlando estis 19,95% kompare kun tiu de Anglio, kaj ĝis 1800 tiu proporcio konserviĝis, sed la ekonomia evoluigo de Skotlando vere ne estis prioritato por la registaro en la Palaco *Westminster* en Londono, tiel ke la loĝantaro de Skotlando laŭgrade ŝrumpis rilate al tiu de Anglio:

|        |         |
|--------|---------|
| 1851 : | 17,23%  |
| 1901 : | 14,66%  |
| 1951 : | 12,42%; |
| 2001 : | 10,30%; |
| 2011 : | 9,99%.  |


Du grandaj periodoj de dekadenco estas evidentaj: la forigo de la kamparanoj dum la 19a jarcento far la grandaj terposedantoj por anstataŭigi ilin per ŝafoj; kaj la forigo de pezaj industrioj kiel ekzemple ŝipfarado, ŝtalfabrikado, karbominado ktp depost la 1970aj jaroj kaj precipe dum la reĝimo de *Margaret Thatcher* pro privatigo ktp.

### LA IMPERIO FINIĜIS

Klare, malgraŭ la fakto ke Skotlando ne ludis gvidantan rolon en la Angla imperio (aŭ “Brita” imperio, por doni al ĝi la oficialan merkatan nomon), skotoj kunkulpis en la krimoj de la imperio. Sed venis tago kiam iĝis klare, ke tiu rolo ne plu ofertas al la Skotoj ion ajn. Travivinte la historion de tiuj lastaj jardekoj, mi taksas ke ĉio komencis ŝanĝiĝi eble ĉirkaŭ la mezo de la 1960aj jaroj. Revekiĝis sento de subpremata nacio; tiuj, kiel mi, kiuj ne spertis la duan mondmiliton, komencis plenaĝiĝi, kaj konsciiĝis, ke io misas.

En 1955, plimulto da skotoj voĉdonis en tutbrita balotado por la dekstrema britimperiisma konservativa partio. Oni ne sciis tiam tion, sed depost tiu jaro subteno por tiu partio ofte reganta Brition kiel tuton ŝrumpis jaron post jaro en Skotlando (sed ne en Anglio). Tiam la ideo pri Skota Parlamento, kun eĉ la limigita fasko da respondecoj havotaj la parlamento kunvenonta en 1999, estis revo de idealistoj, kun nulprocenta ŝanco realiĝi. Sed

la reĝimo de *Thatcher* vere substrekis por tiuj, kiuj atentis, ke la imperio vere finiĝis.



Vikimedia, 2007. Aŭtoro: *Mogens Englund*.

**Ĉefa salono de la skota Parlamentejo en Edimburgo.**

### LA PARLAMENTO REKUNVENAS

En 1979 la skotoj voĉdonis por “assembleo” kun limigitaj potencoj. Malgraŭ la rezulto, tiu assembleo ne efektiviĝis. La sekva projekto, naskita dum la rezisto al la *Thatcher*-registaro, estis por “parlamento” kun pli da potencoj, kaj tio aprobiĝis en referendumo en 1997. Post la efektiviĝo de la Parlamento en 1999, oni pli kaj pli konsciiĝis, ke ĝi estas sukceso. La decidoj disponigi universitatan instruadon, medikamentojn kaj poroldulan vartadon, ĉiujn tute senpage, fariĝis popularaj, kaj multaj opiniis, ke pli da potencoj estas dezirindaj, kvankam ili ne pretis subteni plenan sendependecon; nun tiuj kiuj malferme proponas, ke la parlamento posedu malpli da potencoj, estas vere malfacile troveblaj. La “Skota” “Laborista” Partio (fakte sub la ordonoj de la estraro en Londono) formis la unuajn du skotajn registarojn de la moderna epoko en koalicio kun la liberal-demokratoj, sed la Laborpartia glitado dekstren, ekzemple pri la iraka milito, tamen permesis al la sendependisma Skota Nacia Partio (SNP) pli okupi la social-demokratian politikan teron forlasitan de la laborista partio precipe je brita nivelo. En 2007 la SNP venis al potenco en Skotlando kiel minoritata registaro kun la neoficiala subteno de la verduloj. Kiel registaro, la SNP estis juĝita kompetenta. La nomo de la registaro ŝanĝiĝis de “*Scottish Executive*” (skota plenuma konsilio) al “*Scottish Government*” (skota registaro). Komisiono de la brita parlamento kunvenis responde por diskuti

pliajn povojn por la Skota Parlamento. Ĝis nun nur bagatelaj ŝanĝoj estis ceditaj.

### KIE NI ESTAS NUN

En 2011 la Skota Nacia Partio surprizis preskaŭ ĉiun kaj fariĝis majoritata registaro. Do, ĝi povis enkonduki leĝon por referendumo pri skota sendependiĝo, propono ĝia kiu estis blokita de la laboristoj, liberal-demokratoj kaj konservativuloj dum la antaŭa parlamenta periodo. La brita registaro post iom da plendado decidis akcepti la rajton de la Skota Parlamento okazigi referendumon, kaj faris la necesajn leĝajn ŝanĝojn por permesi tion. Interkonsenton subskribis la du registaroj, la skota kaj la brita, en oktobro 2012, en kiu ambaŭ devigis sin akcepti la rezultojn de la baloto kaj kunlabori. Tiurilate la situacio de Skotlando estas iom malsimila al tiu de Katalunio, kaj oni povas antaŭvidi situacion en kiu Skotlando paŝos senprobleme (kvankam ne “aŭtomate”) de pozicio kiel parto de EU-membroŝtato al pozicio de memstara EU-membroŝtato. La sola diskutindaĵo estos ĉu Skotlando havos 12 aŭ 13 deputitojn en la Eŭropa Parlamento (anstataŭ la nunaj 6).

### LA KAMPANJOJ

Estas du kampanjoj kontraŭaj inter si: la JES-kampanjo, subtenata de la SNP, Skota Verda Partio, la Skota Socialista Partio kaj diversaj individuaj membroj kaj eks-membroj de la Laborista Partio, kaj: la NE-kampanjo, subtenata de la Laborista Partio oficiale, la Liberal-Demokrata Partio, la Konservativa Partio, la dekstrema kontraŭ-Eŭropa partio UKIP, rasistoj, faŝistoj kaj stranga speco de dekstremuloj troveblaj nur en Skotlando kaj Irlando, la ekstrem-protestantaj “orangistoj”, kies nomo rilatas al 18a-jarcenta nederlanda princo kiu fariĝis reĝo de la Unuiĝinta Reĝlando (Britio) en 1688 por “savi” ĝin de katolikismo.

La taktiko de la NE-flanko estas substreki la malcertecojn, sed ili ne povas montri bildon pri kia estos Skotlando se ni voĉdonos por NE. Diversaj anglaj politikistoj promesis punojn.

La estonteco ĉe JES estas necerta, sed la skota registaro publikigis gvidlibron kun 670 paĝoj pri kia estos Skotlando post sendependiĝo, “Scotland’s Future” (La estonteco de Skotlando). Parto de tio aplikigas nur se fariĝos SNP-registaro en la balotado post sendependiĝo, sed mi pretas akcepti ĉion, eĉ se mi ne konsentas kun ĉiu punkto kaj komo. La dato de sendependiĝo estos la 24a de marto

2016, do proksimume 18 monatojn post la referendumo.

### LA ESTONTECO DE SKOTLANDO

Substrekinde estas, ke la strebo por sendependeco ne rilatas al religio, nek al etneco. La subteno por sendependeco inter skotaj civitanoj de angla origino estas egale alta kiel ĉe “indiĝenaj” skotoj kaj aliaj enmigrintoj. Ne estas gravaj lingvaj demandoj: la skotgaela jam havas oficialan statuson kaj subtenon de la registaro. Eduke kaj kulture oni pli alte taksas la skotan lingvon (tre parenca al la norma angla) ol iam ajn de kiam Skotlando ĉesis esti sendependa lando.

La demando pri sendependeco leviĝis pro – politikaj – kialoj. Dum jardekoj la rezulto de britaj balotadoj liveris registaron kun programo pli dekstra ol tiu kiun volas la Skotoj, kaj cetere kun registaro kiu neglektas Skotlandon. Skotlando supervivis pli ol 300 jarojn enkorpigita en alia regno, kaj nun signifa proporcio de ĝiaj loĝantoj volas ke ĝi fariĝu denove normala lando, kun propra registaro. Tamen, ni havas jam kelkajn rajtojn, neniu arestas nin pro propagandado de sendependismaj ideoj, aŭ persekutas nin pro uzado de niaj indiĝenaj lingvoj. Homoj timas ŝanĝon kaj devas al kutimiĝi al la ideo de sendependiĝo. En la nuna situacio laŭ opinisondoj la JES-flanko estas 9% malantaŭ la NE-flanko. Ju pli proksimen ni venas al la tago, des pli la homoj findecidos. En la Kebekia referendumo antaŭ kelkaj jaroj, la JES-flanko estis 20% malpli populara ol la NE-flanko, sed en la tago mem malgajnis je nur 0,5%.

Ni vidos. Mi esperas reveni al ĉi tiuj paĝoj post septembro 2014 kun bona novaĵo: la “brita” imperio baldaŭ tute ne plu estos, ĉar mi supozas, ke Kimrio postnelonge sekvos nin.

**ER**



Vikimedia, 2008. Aŭtoro: Amanda Slater.

**Bonvena panelo en la angla kaj en la gaela.**

# VALENCILANDO

## RESTAS SEN KATALUNLINGVA TELEVIDO

Post ĵusa kolektiva maldungo de 952 laboristoj okazinta en la institucia Valencilanda Radio-Televido (RTVV), mardon la 5an de novembro matene la Valencilanda Alta Kortumo publikigis verdikton nuligantan ĝin. La saman tagon vespere *Alberto Fabra*, prezidanto de la valencilanda registaro, anoncis la tujan fermon — tiel frue kiel “la leĝaro ĝin permesos” — de la “publika” societo. En la sama anonco, li asertis, ke ne estas sufiĉe da mono por redungi la laboristojn maldungitajn kaj teni la ĉefajn celojn de lia registaro, kiuj laŭ li estas “eduko, sano kaj sociala politiko”. La tuta estraro de RTVV demisiis pro manko de fido al la valencilanda registaro. Tio kaŭzis du tagojn

de memmastrumado, dum kiuj la laboristoj regis la entreprenon, sed rapide estis nomumita nova estraro por definitive likvidi ĝin. La 27an de novembro la regiona parlamento, kie la partio de *Fabra* (Popola Partio, PP) havas la plimulton de parlamentanoj, aprobis la fermon de la societo. Je la 0a horo de la 29a de novembro la valencilanda registaro provis fermi la instalaĵojn de RTVV. La radiostacio tuj ĉesis elsendi, sed la laboristoj de la televida produkto tenis sin firmaj kaj daŭrigis la elsendon ĝis la 12h.19, kiam la likvidanta komisiono, akompanata de la polico, eniris la konstruaĵon kaj ĉesigis ĝin. Post multaj provoj, finfine Valencilando restis sen katalunlingva televido.

Valencilando estis la lasta teritorio okupaciata de la faŝismaj trupoj post la Hispana Enlanda Milito (1936–1939), kie ili faris sisteman gentomurdon kaj starigis reĝimon de teroro. La kataluna lingvo, propra al la lando, estis plene forigita el la publika vivo ĝis la morto de la gentomurdestro *Franco* [pron. Franko] (1975). Dum tiu periodo alvenis kaj la plej gravaj ondoj da enmigrintoj (hispanlingvaj) el la tuta historio kaj la televido (nur hispanlingva). En 1978 la frankistoj interkonsentis kun siaj plej moderaĵ



Vikimedia, 29.11.2013. Aŭtoro: Ferbr1.

**Manifestacio antaŭ la RTVV-sedejo la tagon de ties fermo.**

opoziciantoj la nunan reĝimon. Oni kutime konsideras ke, la Transiro finiĝis en 1982, kiam la Hispana Laborista Socialista Partio (PSOE) venkis en la elektoj al la hispana parlamento; de tiam ĝis 2008 furoris en la hispana ŝtato la tiel nomata “*cultura del pelletazo*” (laŭvorte “kulturo de la pilko-frapo”), familiara esprimo por signifi ege profitan spekuladon ebligantan al kelkaj senskrupululoj facile kaj rapide riĉiĝi je la kosto de aliaj. Dum tiu epoko la politikistaro tranĉis larĝe el fremda led.

La politika sistemo, laŭ kiu Hispanio estis regata ekde 1978, plene tenas la jurajn, sociajn, politikajn kaj ekonomiajn strukturojn de la frankismo, sed maskitajn per demokratecaj kaj malcentralizaj ŝajnigoj. Por kredebliĝi tian fikcion oni kreis la “aŭtonomajn komunumojn”, kiuj distenas katalunlingvanojn en kvin teritorioj kun malsamaj leĝaroj kaj rajtaroj. En tiu “nova” reĝimo, Valencilando, la aŭtonoma komunumo kie la frankismo plu estis plej forta, iĝis laboratorio por sociaj, politikaj kaj ekonomiaj eksperimentoj. Ekzemple, kiam en 2006 la Aŭtonoma Komunumo Katalunio (AKK) faris plibonigan reformon de sia leĝo pri aŭtonomeco, hispanaj naciistoj uzis reformon de la leĝo pri aŭtonomeco de Valencilando



por doni kontraŭekzemplan al la aliaj aŭtonomaj komunumoj. Pri la rilatoj de Valencilando kun AKK, indas memori, ke la frankismida Hispanio neniam agnoskis la katalunecon de valencilandanoj. Cetere tiuj novaj administracioj aŭtonom-komunumaj senĝene akceptis la koruptajn kaj mafiecajn kondutojn de la frankismo.


La 11an de septembro 1985 atingis Valencilandon la elsendoj de la Katalunia Televido, la unua katalunlingva televido. Ĝis tiam estis nur du televid-kanaloj, ambaŭ hispanlingvaj kaj dependaj de la ŝtata registaro. Kultura asocio, *Acció Cultural del País Valencià* (ACPV, “Valencilanda Kultura Ago”), kun la kunlaboro de dekoj da miloj de anonimaj valencilandanoj, kreis reton de plusendiloj, kiu dum 25 jaroj ebligis la televidan ricevadon. Laŭlonge de la jaroj, la elsendoj de la Katalunia Televido en Valencilando suferis diversajn malhelpojn fare de la aŭtoritatoj, ĉu hispanaj, ĉu valencilandaj, de ambaŭ politikaj tendencoj. La hispana ministro *José Barrionuevo* [pron. Ĥose’ Barjo-nŭevo] (PSOE) sendis ĝendarmojn por fermi plusendilojn; la prezidanto de Valencilando *Eduardo Zaplana* [pron. Saplana] (PP) kaŭzigis teknikajn interferojn en la signalo de la Katalunia Televido; sed la plej gravaj atakoj okazis, kiam la valencilanda prezidanto *Francisco Camps* [pron. Fransisko Kams] (PP) juĝe persekutadis ACPV kaj altrudis al ĝi multmilionajn monpunojn cele al fermigo de la plusendiloj kaj ruinigo de ACPV, kiu finfine devis cedi kaj ĉesigi la plusendojn en februaro 2011.

Unu el la plej uzataj malhelpoj estis asigni la frekvencojn, per kiuj la kataluna televido alvenis en Valencilando, al nove aperantaj televid-kanaloj. Unue tiel oni faris por la institucia RTVV, sed poste ankaŭ por diversaj komercaj televid-kanaloj hispanlingvaj. En 1989 komenciĝis la RTVV-elsendoj. Male al tio, kion asertas la teksto de ĝia fonda leĝo, la celo de tiu ĉi societo ne estis helpi la lingvonormaligon de la kataluna, sed ĝin malhelpi kaj dissemi katalunofobion en Valencilando. Ĝi naskiĝis por neebli, ke valencilandanoj kreskigu favoran inklinon por la tria televid-kanalo alvenanta al ili, la ununura en ilia lingvo. Laŭ socilingva vidpunkto, RTVV neniam pridubis la hegemonion de la hispana super la kataluna; laŭ vidpunkto de lingva kvalito, redaktistoj kaj parolistoj senhonte plezuriĝis per netolerebla lingvaĉo; laŭ vidpunkto de la uzado, preskaŭ la tuta programaro de la tiel nomata valencilanda televido, escepte de la informaj kaj porinfanaj programoj,

estis hispanlingva. Post la malapero de la ricevo de la Katalunia Televido en Valencilando, RTVV perdis sian ĉefan ekzisto-kialon.

La RTVV-amaskomunikilaro ekde la komenco iĝis simpla proparolanto de la regiona registaro kaj pli kaj pli instrumento por izoli sian spektantaron de la realo. Ĝi taŭgis por havigi sinekurojn al lakeoj kaj sbiroj de la reganta partio. Tie politikaj komisararoj cenzuradis enhavojn kaj direktis la manipuladojn de la informoj. La cenzuro atingis lingvajn aspektojn: ekzemple, la unua ĉefdirektoro de RTVV, dum la prezidanteco de *Joan Lerma* [pron. Ĝuan’ Lerma] (PSOE), eĉ faris liston de vortoj nepermesitaj pro la fakto, ke al li ŝajnis ili “tro katalunaj”.

La fermon de RTVV oni devas konsideri kiel



parton de la kontraŭkrizaj rimedoj. Valencilanda Aŭtonoma Komunumo (VAK), regata de PP dum jardekoj, estis ekzemplo de malbona administrado kaj malŝparo dum tempoj de abundo; dum tempoj de manko la sama partio celas igi ĝin ekzemplo de rezignacio kaj submetiĝo al la novliberalaj rimedoj. Nuntempe VAK estas “elaĉetita” de Hispanio, kio signifas, ke ĝi perdis eĉ sian plej nominalan aŭtonomecon. Ekde la eksplodo de la krizo, ĉiuj “trojkaj” (1) registaroj — sendepende de sia politika tendenco — intensigis sian privatigan diboĉadon, kiu jam komenciĝis antaŭe. Tamen RTVV, flagŝipo de la valencilanda frankisma oligarkio, estas aparte rivela pro siaj administro-manieroj. Tiu societo partoprenis, ekzemple, en la supozata malapero de publika mono en okazoj kiel la vizito al Valencio de la papo Benedikto la 16a aŭ en la supozata fraŭda financado de piedpilkaj kluboj. Al kvar eksestraraĵoj la justico imputis koruptojn rilatajn al la kazo



Kapo de la manifestacio de la 30a de novembro 2013 en Valencio.

*Gürtel* — supozata reto de koruptado ligita al la hispana direkto de PP dum la epoko de *José María Aznar* [pron. Ĥosemaria Asnar] kaj al altpostenuloj de diversaj regionoj regataj de tiu partio; estas eĉ estrarano akuzita de seksaj agresoj. Sed ne surprize: la valencilanda PP havas pli ol cent politikistoj implikitajn en kazoj de koruptado, el kiuj multaj sidas en la regiona parlamento. La ŝuldo imputata al RTVV, fakte, estas atribuebla al la valencilanda registaro, kiu centrifugis publikan monon per la televido por transsalti la obstaklojn kaj ĝin distribuadi laŭ sia konveno. Kaj nun Valencilando devas doni ekzemplon de submetiĝo al la kontraŭsociaj rimedoj de la “trojkaj” (1) registaroj, aŭ rimedoj de “aŭstereco” — laŭ la komuniza eŭfemismo. Ĉiuj regionaj televidoj atentis la novaĵojn pri RTVV: oni ja scias, ke Valencilando estas la laboratorio de la frankismida reganta klaso. Ili prave pensas: “Se brulas domo najbara, pri la propra estu garda”.

La valencilanda frankismida oligarkio estas provinca kaj hispanema. Ĝi sisteme malobservas la minimumajn postulojn demokratiajn en la administrado de la publikaj societoj. Ĝi akre malamas la katalunajn lingvon kaj kulturon, kaj klopodas malaperigi ilin; tial atake ilin persekutas en lernejoj kaj amaskomunikiloj. La valencilanda frankismida oligarkio ankaŭ disdegnas la naturon kaj pejzaĝon de la lando, per kiu ĝi komercaĉis senskrupule kaj sen ia respekto. Ĝi renversis la sistemon de publika sano kaj la bazan teksaĵon de la valencilanda ekonomio, la mezajn kaj malgrandajn entreprenojn. Ĝi eĉ ruinigis la kreaĵojn de sia propra klaso, kiel la Bankon de Valencio

kaj la ŝparkasojn. Sed ĝi ne estas kapabla postuli la mediteranean trajnkoridoron kaj konstrui ĝin. La frankismida oligarkio plene malsukcesis kiel superreganta klaso.

Kelkfoje oni parolas pri identeca problemo, sed tie ne temas pri identeco; temas pri libermanko kaj malegalrajteco. La lasta espero por Valencilando, la lasta espero por la kataluna gento entute, estas la tuta kaj definitiva malsukceso de Hispanio kiel regno. Sabate la 30an de novembro dekoj da miloj da valencilandanoj okupis la stratojn en Valencio kaj Alakanto por manifestacii kontraŭ la decido de la registaro. La portebla afiŝo

malfermanta la marŝon diris: “Anticipajn elektojn nun!”, kaj la plej unuanima krio estis: “*Fabra*, demisiu.” La RTVV-laboristoj marŝis kune en bloko kun la afiŝo: “RTVV nefermiĝas — Ĝi estas la via. La kontraŭsociaj rimedoj de la tripartia registaro lasis multe da homoj sen laboro kaj sen hejmo; ĉio estis akceptata kun rezignacio. Tamen la fermo de televido elirigas surstraten amason da civitanoj indignitaj. Ĉu la humiligo esti la unua aŭtonoma komunumo perdanta sian televidon havos eĉ la valencilanda idiosinkrazio la saman efekton kiel la humiligo de la leĝo pri aŭtonomeco havis eĉ la civitanaro de AKK? Oni vidos *J-H P-B*”

Noto: (1) “Trojko” ne estas en PIV, ni tamen konservis la uzon de la aŭtoro kun la signifo de registaro, kiu aplikas la politikojn de la – Internacia Monunua Fonduso, Komisiono kaj Eŭropa Centra Banko –. NdR



La laboristoj de la RTVV manifestacias.

## BALEARA REVOLUCIO

**L**a 29an de septembro okazis en Balearoj la plej granda manifestacio iam ajn en la insuloj. Pli ol 100 000 el la 1,1 milionoj da loĝantoj surstratiĝis en la kvar insuloj du semajnojn post la oficiala komenco de la lernojaro por protesti kontraŭ nova leĝo de la baleara registaro, kiu malkreskigas la nombron de instrueroj en la kataluna lingvo. Eĉ pli mirinda estis la instruista striko kontraŭ la leĝo dum la unuaj tri semajnoj de la lernojaro. Ilia agado havis vastan popolan subtenon. Granda parto de la gepatroj rifuzis sendi siajn infanojn al la lernejo dum la periodo de la striko, organiziĝis grandskala kolektado de mono por helpi la strikantojn kaj okazadis nenombrebla kvanto da aranĝoj por klarigi la kialojn de la agado.

La konflikto koviĝis esence dum la lastaj du jaroj. De preskaŭ 30 jaroj la kataluna estas la ĉefa instrulingvo en Balearoj. En tiu periodo registaroj el diversaj partioj iom post iom plifortigis la rolon de la kataluna lingvo en la edukistemo kaj administracio. En la pasintaj elektoj de la jaro 2011 la dekstra Popola Partio denove akiris la potencon. Tiu politika grupo plej ofte regis la insulojn en la lastaj jardekoj kaj de la sama jaro regas ankaŭ en Hispanio. Ĝia elekto-programo anoncis plifortigon de la instruado de la angla lingvo, sed silentis pri kernaj ŝanĝoj en la instruisistemo.

En la kurso 2011/12 la registaro patronis la kreadon de apartaj hispanlingvaj grupoj en la lernejoj, sed rikoltis frontan opozicion de la instruistoj, ĉar laŭ ili tio kaŭzus segregacion surbaze de lingvo en la lernejoj. La hispanlingva instruado allogis malmultajn gepatrojn, kiuj pri la edukado de siaj filoj preferis sekvi la rekomendojn de la pedagogoj kaj ne emis senigi ilin de plena posedo de la kataluna. La lanĉo de aliaj leĝoj por la oficialigo de hispanizitaj loknomoj kaj por la nedevigo scipovi la katalunan por enposteniĝi en la baleara administracio montris, ke la celoj de la edukreformoj ne estis pedagogiaj (vd. *Etnismo* 90, p. 14-15).

Rezulte de la malsukceso, la baleara parlamento en rekorda tempo akceptis novan edukleĝon, laŭ kiu la instruado okazos katalune, hispane kaj angle por ĉiuj. La leĝo, tamen, estas tute neplenumebla pro la manko de instruistoj kapablaj sufiĉe bone instrui siajn fakojn en la angla. Estus necesaj tre fortaj investoj por kapabligi instruistojn. Tio montriĝas nerealigebla en la aktualaj ekonomiaj cirkonstancoj de aŭstereco, postulata de Eŭropa Unio, kiujn la baleara registaro pretekstis por drasta reduktado en la investoj en edukado. Tio interalie kaŭzis la malaltigon de la instruistaj salajroj kaj novajn normojn por eviti la anstataŭadon de malsaniĝintaj instruistoj.



**Por miaj gefiloj, por miaj gepatroj, por miaj gefratoj, por miaj najbaroj, por miaj amikoj, por mia vilaĝo, por mia kulturo, por mia lingvo, por mia pasinteco kaj precipe por nia estonto, mi subtenas la strikon de la instruistoj en la Balearaj Insuloj.**

La nova leĝo estis kontestata eĉ interne de la Popola Partio. Bloke la instruistaro kontraŭstaris ĝin, kio praktike malebligas edukreformon. Krome, pri la leĝo ne okazis konsulto kun la universitato, kvankam tia paŝo estas laŭleĝe deviga okaze de edukreformo. Tiu lasta fakto igis, ke la Supera tribunalo de Balearoj haltigis la aplikadon de la leĝo, sed la tagon antaŭ la komenco de la lernojaro la registaro elruzis juran mistifikon por eviti la verdikton. Tio ĉi flamigis la etoson ĝis senprecedencaj niveloj.

La situacio nuntempe estas ekstreme streĉa. La baleara registaro neniel fleksebligis sian pozicion, malgraŭ diversaj eksciĝoj kaj konstantaj protestoj en ia ajn publika aranĝo, en kiu ĉeestas ĝiaj membroj. Post la tri-semajna striko, instruistoj strikis en unuopaj tagoj, sed tiu vojo estas evitata por ne malutili al la familioj, kiuj tiom subtenas ilian batalon. Komenciĝis diversaj tipoj de pasiva rezistado, tamen ankaŭ tiu vojo montriĝas tre malfacila pro la rezoluteco de la registaro puni ĉiujn malobservantojn de la novaj instrukcioj, eĉ se tiuj kolizias kun la leĝo. La tribunaloj decidis pri la laŭleĝeco de la plimulto de tiuj punoj. La grado de ekstremismo en la registara agado estas malfacile komprenebla, des pli pri elpaŝoj ne anoncitaj en la elekto-programo kaj kontraŭantaj lingvo- kaj edukpolitikon kun-konstruitan de la Popola Partio dum jardekoj en etoso de interpartia interkonsento. Necesas ĝin rigardi en kunteksto de ĝenerala naciisma radikaligo de la Popola Partio, ne nur en Balearoj. Plej probable tiu situacio havos akrajn sekvojn por la partio en la municipaj elektoj de 2014, kaj tio vekas maltrankvilon en parto de ties postenuloj. **HAI F**

## ARTISTOJ SUBTENAS CIGANOJN



La Fabelo de Heidegger.

«Signifa parto de la ciganoj ne taŭgas por kunvivado. Ne taŭgas por vivi inter homoj. Tiu ĉi parto de la ciganaro estas bestoj kaj kondutas kiel bestoj. Ili volas tuj kopuli kun ĉiu, kiun ili ekvidas. Se ili renkontas reziston, ili murdas. Ili ekskrementas, kie kaj kiam ili ekhavas urĝon. Se ili ial sentas sin limigitaj en tio, ili murdas. Kion ili vidas, tion ili volas havi. Se ili ne ricevas ĝin tuj, ili prenas ĝin kaj mortigos. Tiu ĉi parto de la ciganoj estas nekapabla je ajna komunikado nomebla homa. El iliaj bestaj kranioj sputiĝas pleje misartikulaciitaj sonoj, kaj la sola afero kiun ili komprenas en ĉi tiu mizera mondo estas perforto.»



Vikimedia, nekonata aŭtoro. Arkivoj el Federala Germanio.

**Renningen / Leonberg, Germanio, truda alveno de policistoj, 1937.**

Tio estas unu kvazaŭ-naziisma teksto (05.01.2013) el pluraj komentoj de Zsolt Bayer en la gazeto *Magyar Hírlap* pro abomena krima agado de tri ciganoj en Hungarujo. Ne iu fekaĵo de leganto en Interreto, sed de kolumnisto, pagata de tiu ĵurnalo.

La temo levis furiozan diskuton inter kontraŭuloj kaj komprenemuloj de tiaj tekstoj en retdiskutlisto de hungaraj esperantistoj. Mi partoprenetis en tiu diskutado, estante membro de *Khetanes*, iniciato, kiu prezentas sin mem en Interreto jene (tradukita el la angla):

«Ni, artistoj el la tuta mondo, pentristoj, poemistoj, teatroverkistoj, aktoroj, filmverkistoj, fotistoj, karikaturistoj, dancistoj, muzikistoj, skulptistoj kaj kantistoj, unuiĝas kontraŭ “romafobio” (kontraŭ-romaa suspektemo) kaj ajna alia esprimaĵo de malamo kontraŭ homoj.

Ni ne kredas en la simpligoj, kiuj fundas ŝablonkliŝojn kaj praktikadon de nigraŝafigado. Ĉiuj homoj estas malsamaj, sed egalaj. Tio ne estas kontraŭdiro sed kondiĉo por justeco.» (1)

La iniciato *Khetanes* agas kontraŭ la negativa publika bildo de ciganoj (romaoj kaj sintioj). Tiu estas historie difinita kaj facile trovebla en modernaj publikigaĵoj. Por mencii ekstreman ekzemplon:

«La kaŭzo kial multaj ciganoj estas mense malsanaj estas, ke en la romaa kulturo estas permesite por fratinoj kaj fratoj aŭ gekuzoj geedziĝi aŭ nur havi seksajn rilatojn unu kun la alia. Tiuj ĉi romaa kutimoj estas ligitaj al malriĉeco kaj krimo.» (2)

Ke tiu bildo influas ne nur individuojn, sed ankaŭ la politikon de aŭtoritatuloj, estas konata. En 2012 *Ronald S. Lauder* (3) diris: «La protektado de siaj malplimultoj estas lakmusa testo (4) por la hungara demokratio.» Jen kio okazis dum la pasintaj dek jaroj: en Bulgarujo romaa infanoj mortis en orfejoj, en Italujo estis pogromoj kaj mortigado fare de venĝemaj amasoj, en Hungarujo ktp ... La situacio de romaoj fariĝis tiel malfeliĉa, ke centoj da ili migris al Kanado kiel politikaj rifuĝantoj. Francujo kaj Italujo

faris diskriminaciajn disponojn kontraŭ ciganoj. Sed ne nur ili. Eŭropaj membroŝtatoj jam subskribis interkonsentojn de “reakcepto” kun orient-eŭropaj landoj, kio ebligas al ili forpeli milojn da ciganoj forkurintajn en la jaroj 1990aj al Germanujo kaj aliaj okcidentaj landoj kaj kies gefiloj naskiĝis en okcidento.

Ankaŭ municipaj aŭtoritatoj mispaŝas. *Amnestio Internacia* en pasinta aŭgusto raportis pri ciganoj en Rumanujo:

**“Pluraj ciganaĵaj familioj vivantaj en la setlejo Craica en la urbo Baia Mare (Rumanujo) riskas esti forpelitaj el sia hejmo ajnmomente.”**

Ĉirkaŭ tridek familioj ricevis ordonon de la loka polico detrui sian hejmon ene de du tagoj. Ĉi tio ĉar ili ne estas en posedo de loĝadpermeso. La aŭtoritatoj minacas detrui iliajn domojn, se ili ne respondas al la alvoko. Tri familioj malkonstruis sian hejmon, kaj aliaj dek kvin domoj estis platigitaj de la aŭtoritatoj. Neniu el la familioj ĝis nun ricevis anstataŭan loĝlokon.

La ceteraj loĝantoj povas esti forigitaj iam ajn el siaj hejmoj. La situacio en kiu la familioj loĝas estas prema. Multaj el ili, inkluzive de beboj kaj junaj infanoj, vivas sub tre severaj kondiĉoj. La lokaj aŭtoritatoj faris malmulte aŭ nenion por protekti la loĝantojn.»

*Khetanes* estas mastrumata de *Els de Groen*, nederlanda eks-membro de Eŭropa Parlamento, kiu plurajn monatojn vivis kun ciganoj dum ŝi verkis plurajn librojn pri ilia situacio.

En komento el 2010 antaŭ Radio Libera Eŭropo (5) ŝi asertis:

«La kreskado de ekstreme dekstremaj partioj en Eŭropo komenciĝis antaŭ 15 jaroj, nutrate de la frustrigoj de orient-eŭropanoj, kiuj bezonis almenaŭ trioble pli da salajroj por nutri unu familion. Estante mem malriĉaj, ili ofte kulpigis la plej malriĉajn pro ilia mizero - la ciganojn. Estas ĉiam pli facile fingromontri vian najbaron ol analizi kompleksajn



Vikimedia, aŭtoro: El capitan.

**Somero 2003: cigana setlejo en Serbio proksime de Kosovo. Tiuj ĉi homoj fuĝis el Kosovo antaŭ la milito.**

situaciojn, precipe kiam la haŭto kaj tradicioj de via proksimulo estas malsamaj. Kelkfoje eksaj komunistoj apogis dekstremajn movadojn ĉar kalumnii ciganojn deturnis la atenton de la kreskanta riĉeco de la feliĉaj malmultoj.»

Ŝi faris plurajn klopodojn vekti la intereson de la Eŭropa Komisiono pri la fifamigado kaj mistraktado de ciganoj kaj komenci “Ciganan Strategion” (6): konkretajn paŝojn kiuj kondukos al socia inkludemo en edukado kaj labor-ebloj. La komisionanoj rifuzis.

Kun dek milionoj da homoj “Romaujo” ampleksas dudekoblon de la loĝantaro de Luksemburgio. Romaoj, tamen, eĉ ne havas unu reprezentanton en la komisiono (7) Ankaŭ la ĵus formita Laborgrupo ne inkluzivas romaojn. Kial ciganoj, ĉeestantaj en multaj ŝtatoj kaj reprezentantaj tiom da religioj, malhavas la naciisman subtenon, kiun aliaj civitanoj ĝuas?

La membraro de *Khetanes* nun estas 900. Malgraŭ tio la rezultoj de la agado de *Khetanes* estas etaj. Diversaj projektoj estis proponitaj por subvencio de la Eŭropa Komisiono, sed neniu peto estis akceptita.

*Khetanes* naskiĝis el la kredo, ke kunigi ĉiujn elstarajn artistojn, instruitulojn kaj ĵurnalistojn, ĉiujn talentojn kaj kapablojn de la cigana komunumo, estas

la plej bona maniero por haltigi la kontraŭromaajn suspekta-don kaj apartismon en Eŭropo. Malgraŭ ĉio *Khetanes* ankoraŭ ne estis akceptita kiel egala partnero de la ne-cigana plimulto.

La fakto, ke Eŭropa Unio ne disponigas financojn kaj ne faras politikan geston direkte al la ciganoj, iel rilatas kun ĝia sinteno al la peto de Eŭropa Esperanto-Unio registri popoliniciaton, por atingi, ke la Komisiono devu trakti la proponon, ke la Eŭropa Himno (la fina ĥoro



Vikimedia, 11.04.2012. Aŭtoro: Anton Lefterov.

**Roma distrikto de Filipovtsi, Sofia.**



de la naŭa simfonio de Beethoven *Alle Menschen werden Brüder*) estu kantata en Esperanto. Ambaŭ kulturoj, la esperanta kaj la romaa, estas diasporaj kulturoj, kiuj en neniuj eŭropa lando havas oficialan nacian rekonon. *Els de Groen* diras pri tio:

«La malnovaj kutimoj ankoraŭ loĝas en niaj kapoj. Multaj preskaŭ laŭvorte timas, ke politika integriĝo kostu ilian nacian identecon. Tiu timo estas nutrata de populisma kaj ekstrema dekstremularo. Tute eblas gardi la identecon (8) en kunlaborado kun aliaj. En tia situacio ankaŭ malfermos sin perspektivo de eŭropa civitaneco, kiu ekzemple por ciganoj estus bonvena helpo.

Kaj tiam ni jam ne estos hezitemaj pri kantado de *Alle Menschen werden Bruder* en Esperanto.» *JD*

Notoj:

(1) Sin turni al “artistoj” estas oportune por ekinteresi ĝuste tiujn homojn, kiuj kapablas kaj pretas veki per siaj artaĵoj la konsciencon de intelektuloj. Ĉiu ne-artisto kaj ne-intelektulo povas membriĝi.

(2) *Post-communist Europe and its National/Ethnic Problems: a course-pack* , *Budapest, Kairosz*, 2009, p.

273. Lernolibro de profesoro *Géza Jeszenszky*, historiisto, nuntempe ambasadoro de Hungarujo en Norvegujo. <http://artists-for-roma-net.ning.com/profiles/blogs/for-those-who-want-to-sign-a-letter-of-protest-against-racist-boo>.

(3) Prezidanto de *World Jewish Congress* (Monda Juda Kongreso).

(4) Ne-erarema testo; lakmusa papero rimarkigas acidecon kaj bazecon de likvajho, kolorigante ruĝe respektive blue.

(5) <http://artists-for-roma-net.ning.com/page/start-of-the-initiative>.

(6) En 2011 stariĝis *EU Framework Strategy on National Roma Inclusion* (EU kadra strategio por nacia inkludo de romaoj). Tiu strategio estas elnombrado de planoj de la ŝtatoj, sen certeeco ke ili estos efektivigataj kaj sen menciado de buĝetoj. Sed la Komisiono povus mem doni bonan ekzemplon de integrado de romaoj en sian oficistaron aŭ per inspektado de romajetoj pri plenumado de homaj rajtoj. *Viviane Reding*, komisionano pri justeco, fundamentaj rajtoj kaj civitaneco, ne elpaŝas.

(7) Eŭropa Unio nun havas 28 membro-ŝtatojn. Ĉiu el ili liveras unu komisionanon.

(8) Kompleksa kompreno de kulturaj, historiaj, religiaj, etnaj kaj aliaj identecoj.

## El “Monde Diplomatique” en Esperanto

*Kosovo ne plu integras siajn romaojn*

### MIGRANTOJ SEN ORIGIN-LANDO

Komence de novembro aperis interesa artikolo de *Jean Arnault Derens* en “*Monde Diplomatique*”, esperantigita de *Jeanne-Marie Cash*. Ĝi baziĝas sur la forpelo el Francio de la romaa familio *Dibrani*, kies filino *Leonarda* estas 15jara gimnaziano bone integrita en Francio. Tiu evento, kiu ŝokis la publikan opinion de Francio, donis la okazon al la aŭtoro prilumi aspektojn koncerne la romaojn el Kosovo. Mi citas kelkajn liniojn kaj donas la retejan adreson por konsulti la tutan artikolon:

«Fine de la 1980-aj jaroj, ĉirkaŭ cent mil ĝis cent kvindek mil romaoj vivis en Kosovo, tio estas 5 ĝis 10 % de la tuta loĝantaro de la tiama aŭtonoma provinco. Kosovo estis konsiderata pioniro de la integradaj politikoj disvolvataj de la socialista Jugoslavio: la romaa lingvo estis instruata en lernejoj, kaj en *Prizren*, poste en *Priština*, estis kreitaj la unuaj romalingvaj radio-elsendoj kaj televid-programoj en la mondo.

#### Devigataj elekti sian tendaron

La situacio malboniĝis dum la 1990-aj jaroj, kun la akriĝo de la alfrontiĝo inter la albana plimulto de Kosovo kaj la reĝimo de Beogrado. La romaoj estis devigitaj elekti sian tendaron inter ambaŭ naciismoj. Dum la ekonomia situacio de la lando rapide malboniĝis, multaj serĉis sian savon en eksterlando, kaj tiuj restintaj zigzage navigis por garantii sian pluvivon. Kiam la albanoj estis maldungitaj el la publikaj postenoj aŭ amase ekŝiĝis responde al la subpremo-klimato falanta sur Kosovon, multaj romaoj prenis iliajn lokojn, kio rezultigis, ĉe la fino de la militoj, kolektivajn akuzojn pri “kunlaborado” kun la serba reĝimo de *Slobodan Milosevic*. Tiu akuzo estis preteksto por la multaj perfortaĵoj suferitaj de la komunumo dum la “terura somero” de 1999.»

<http://eo.mondediplo.com/article1997.html>

#### Romaoj en antaŭaj numeroj de *Etnismo*:

- Ciganoj postulas agnoskon. *Etnismo* no 24, p. 13 - 14. 24.07.1980.
- Kaj *Jal i Romani Chib?* (Kien iras la romaa lingvo?), *Marcel Courthiade*. *Etnismo* no 41 p. 3 - 5. 22.04.1987.
- Kien fuĝu romaoj dum ĉiuj malamas ilin? *Etnismo* no 48 p. 25 - 26. 10.05.1991.
- 4a Internacia Kongreso de romaoj. *Etnismo* no 48 p. 27 - 28. 10.05.1991.
- Romaoj: (Hungario) ĉu tradicioj aŭ abiturientiĝo? *Etnismo* no 72 p. 9, *BR* kaj *UJM*. 15.12.2002.
- Minoritatoj en Pollando: La polaj romaoj. *Thomasz Chmielik*. *Etnismo* no 84, p. 11. 31.12.2009.
- Savoja Romao, *Nicole Margot*. *Etnismo* no 85, p. 13 - 15. 31.05.2013

Nicole Margot

# LAŬZANANOJ<sup>1</sup> MANIFESTACIAS POR LA TAGO DE LA ROMAOJ

La romaa popolo okupas pli kaj pli da loko en la eŭropaj gazetoj kun diversnivelaj artikoloj, kiuj foje celas komprenigi la nunan situacion de tiu popolo, sed bedaŭrinde ankaŭ malestimi kaj eĉ insulti ties membrojn, laŭ stilo proksima al la plej nigraj jaroj de la dua mondmilito. Tion raportas *Johan Derks* en ĉi tiu numero de **Etnismo**. Alia esperantisto, *Nikola Rašić*, fake kaj tre interese prelegis kaj artikolis pri romaoj (2): «Romaĵoj estas etno kiu parolas praktike ĉiujn eŭropajn lingvojn, inkluzive la romaan. Laŭ tio ili estas la plej eŭropa popolo el ĉiuj. Ili estas verŝajne la sola etno kiu vivas en praktike ĉiuj eŭropaj landoj kaj povus esti iaspeca ligilo de Eŭropo. Sed estas ja tute male: la romaĵoj ŝajne estas nur problemo komuna al ĉiuj eŭropaj landoj; problemo ŝajne nesolvebla.» Kaj *Nikola Rašić* komencas sian prelegon per provo difini la romaĵojn: «En Eŭropo vivas inter 5 kaj 12 milionoj de romaĵoj, laŭ diversaj statistikoj. La ciferoj varias depende de la difino kio estas romaĵo. Kaj tiu difinproblemo estas grava. Nome, oni povas vidi la romaĵojn kiel socian, kiel etnan aŭ kiel lingvan grupon.» Ĉi-sube mi prezentos personajn travivaĵojn en mia loĝurbo, kiel ekzemplojn de kio okazas en okcidenteŭropaj urboj.

**S**abate matene, la 6an de aprilo 2013, malpli ol 20 personoj staris dum la bazara tago sur laŭzana placo, portante romaajn standardojn. Ili kunvenis tien por memori la Internacian Tagon de la romaĵoj. Fakte ili fruis je du tagoj, ĉar en 1971 la Tutmonda Kongreso de la Ciganoj en Londono, elektante standardon kun ruĝa radego, proponis ke la 8a de aprilo estu dediĉita al la romaĵoj (3).

Tiu manifestacio estis kunvokita de *Opre Rrom* (4), laŭzana asocio por agado kaj solidareco kun la romaĵoj, fondita en 2011. Tiu ĉi asocio celas:

- informi la politikistojn, la gazetaron pere de organizitaj eventoj pri la situacio de la romaĵoj en Laŭzano kaj en iliaj devenlandoj, sed, kiam eblas, ĉefe doni la parolon al la romaĵoj mem;
- akompani ilin en iliaj rilatoj kun la polico, la sanservoj kaj aliaj administraj servoj;
- konstrui pozitivan dialogon inter la laŭzana popolo kaj la romaĵoj.

Tiuj romaĵoj regule venas en Laŭzananon ekde la jaro 2008, same kiel en multajn okcidenteŭropajn urbojn, por almozadi. Oni renkontas ilin en pluraj stratanguloj de la urbocentro, plej ofte sidantajn sur la trotuaro, kun pleniginda uĵeto antaŭ si. Tio rapide ŝokis plej multajn piedirantojn, vekante fortan reagan movadon kontraŭ ili. Klaĉoj apogis kaj pravigis tiun malamon: «temas pri mafiaj retoj, ili veturas per luksaj aŭtomobiloj, homoj kaj infanoj estas ekspluatataj, ktp». Delonge la laŭzana polico mem malkonfirmas tion: en Laŭzano oni neniam malkovris mafiajn retojn inter la almozuloj, tre malofte infanoj akompanas la gepatrojn dum almozado kaj, se tio okazas, la gepatroj rapide ekscias, ke tio malpermesatas kaj lasas la infanojn kun familianoj, bedaŭrinde sen ebleco viziti lernejon. Malgraŭ tiu aserto de la polico eĉ la gazetaro foje apogas tiajn klaĉojn, kaj la oficiala Unuiĝo de la Svisaj Urboj mem vehiklis asertojn tute ne kontrolitajn pri ŝakrado kaj ekspluatado de infanoj. Tio kompreneble tute ne signifas la neekziston de mafiaj fenomenoj kaj



**Véra kaj Jean-Pierre tenas la romaan standardon. Romaĵoj kun membroj de *Opre Rrom* staras dekstre.**

ekspluatadoj en la romaa medio, sed la *Opre Rrom*, same kiel la laŭzana polico, konante la laŭzanan realon, certigas pri la neekzisto de tiaj retoj en Laŭzano mem, almenaŭ inter almozuloj. La fenomeno estas tute alia en la ŝtelista medio, kiu ŝajne ne koncernas la samajn homojn. La membroj de *Opre Rrom* ne neas malfacilajn rilatojn kun la romaĵoj kiuj venas en okcidentan Eŭropon, ili nur kontraŭstaras la ĝeneraligojn, kiuj vidigas en ĉiuj romaĵoj profiteman mafiulon kaj ŝtelulon.

## ĈU ALMOZI ĈU LABORI?

Oni povas kompreni ies retenigon fronte al almozado, en kiuj la monpetantoj perdas sian homan dignon. Dum la manifestacio venis virino al la organizantoj: «Mi ŝatus fari regulan donacon al vi, ĉar mi malaprobas almozadon kaj ne volas tion kuraĝigi, sed ŝatus helpi ilin alimaniere.» *Opre Rrom* en la romaa lingvo signifas: «Ekstaru, romaĵo!» Kaj la filozofio de la asocio konsistas el la ideo, ke la romaĵoj ĝuste konservu sian dignon, sed kion fari kiam oni ne havas kaj nek povas trovi laborpostenojn

en sia lando, tutsimple ĉar oni estas romao? Yves Leresche, (5) fotisto, kiu flegas bonajn rilatojn kun la laŭzanaj romaoj kaj ofte vojaĝas Rumanien, de kie plej multaj almozuloj venas, konfirmas tion: «eĉ la neromaaj rumanoj malfacile trovas laboron.»



**Du membroj de *Opre Rrom* tenas klarigan tabulon.**

Ne antaŭvidite iuj filmis dum la manifestacio. Ilia filmo celas konigi ĉiuj opinioj pri la romaa temo. Haltis piediranto, kiu elokvente kaj pasie paroladis antaŭ la kamerao: «Mi ne komprenas, ke inteligentaj homoj povas subteni tiujn parazitajn, kiuj alportas nenion al nia lando! Ili estas nur asistatoj, ne volas labori! Estas mafiuloj. Ili havas sian landon, ili reiru tien!»

Ni provis klarigi al li, ke *Véra Tchérémissinof*, prezidantino kaj animo de la asocio, foje aperigis anoncojn en iu loka gazeto por serĉi laborpostenojn por romaoj. Ŝi ricevis telefonvokojn de eventualaj dungantoj. Kiam ili eksciis, ke temas pri romaoj, ili ne plu interesiĝis pri tia laborforto.

Eĉ en la asocio iuj hezitas doni monon al tiuj almozuloj. Iu rumandevena virino, loĝanta de kelkaj jaroj en Svislando, venis al la asembleoj de *Opre Rrom* kaj proponis sian helpon: «Multaj el ili ne scipovas legi kaj ne konas iliajn rajtojn en Rumanio. Ili povus ricevi subvenciojn en ilia loĝkomunumo. Ofte oni proponas monhelpon al familioj kondiĉe ke ili sendu siajn infanojn al la lernejo.» Tiu rumanino hontas vidi samŝtatanajn almozi en la laŭzanaj stratoj: «ne donu al ili monon, vi ne helpas ilin!» Ŝi mem maliluziiĝis kiam ŝi helpis junulon por rekomenci sian lernadon en Rumanio kaj konstatis, ke du monatojn poste la junulo forlasis la kursojn por pretigi ekzamenon cele al stirpermeso, kiun li verŝajne juĝis pli utila ol la lernejon.

## ĈU EBLAS STUDI EN LA ROMAA?

Tiu ĉi demandon oni malofte traktas dum la kunvenoj de *Opre Rrom*. La prioritato de multaj subtenantoj de la romaa popolo estas, ke tiuj ĉi integriĝu, kaj ne malofte mi povis aŭdi aŭ legi, ke la romaa lingvo ĝenas tiun integriĝon, ĉar la romaaj infanoj ne havas sufiĉan vorttrezoron en la ŝtata lingvo. La defendo de la romaa lingvo povas aperi al multaj kiel bagatelo fronte al la sociala tuteŭropa problemego de tiu popolo. Kaj pri tio mi reiras al la artikolo de *Nikola Rašić*: «Inter multaj problemoj kiujn ili havas estas ankaŭ la lingva, eble ne la plej grava sed ŝajne same nesolvebla. ... La plimulto de romaoj/ciganoj ja ne parolas la lingvon! ... Ĉiuj plenkreskaj romaoj estas dulingvaj aŭ plurlingvaj, kvankam plej ofte ili nesufiĉe bone regas ĉiujn tiujn lingvojn pro manko de klereco aŭ pro manko de vastgamaj kontaktoj kun neromaaj kaj foresto de plena partopreno en la neromaa socio. Sed samtempe ili ja neglektas kaj perdas la propran lingvon pro deviga partopreno en alilingvaj eduksistemoj kaj pro ekonomia neceso komuniki per aliaj lingvoj... Pli kaj pli malkreskas la t. n. lingva lojaleco kaj kreskas la sento ke la romaa estas nur nenecesa balasto: la gepatroj ne plu transdonas la romaan al siaj infanoj... Aliflanke la nekono de la romaa donas al tiuj junaj generacioj senton pri nekompleteco kaj perdo de grava parto de ilia identeco. Mi aŭdis plendojn de pluraj junaj romaoj ke iliaj gepatroj ne transdonis al ili lingvon ĉar ili ne povas bone interagi kun aliaj romaaj grupoj, ekz. dum kunvenoj de romaaj organizoj... Perdinte la propran lingvon al la etna grupo restas nur la psikologia sento de etna konscio sed ili ja ĉefe reduktiĝas al la unua kriterio: romaoj kiel (nura) socia grupo. Sen la propra lingvo al tiu etna grupo restas kiel difinilo nur la marĝeneco de ilia socia pozicio, sen lingvo la romaoj pli kaj pli sentas sin kiel nuraj “ciganoj” kaj ne vera popolo, nacio.» (2)

## ĈU MALPERMESI ALMOZADON?

Lastjare dekstraj politikaj partioj kolektis sufiĉe da subskriboj por lanĉi referendumon cele al malpermeso de almozado en Laŭzano. La municipo, majoritate socialista, ne povis akcepti “malpermeson” kaj hipokrite kontraŭproponis al tiu referendumo regularon kun tiom da restriktaj, ke ĝi pli-malpli egalas malpermeson. Ĝi devus ekvalidi fine de aprilo 2013. Lastdecembre *Opre Rrom* organizis manifestacion antaŭ la urbodomo, kaj kelkaj romaoj disdonis flugfoliojn al la deputitoj, kiuj eniris por pridiskuti la voĉdonotan regularon: «Ni dankas ĉiujn laŭzananojn, kiuj helpas nin per sia donaco kiam ni almozas en la strato. Dank’al tiu helpo ni kaj niaj familioj restantaj en la lando povas vivteni sin. Kun malmulto tie ĉi oni atingas multon tie. Almozi estas nek plezuro nek elekto sed ni trovas laboron nek tie,

nek tie ĉi.» La plej centristaj partioj akceptis rezigni pri la referendumo, sed Centra Demokrata Unuiĝo (*Union Democratique du Centre*, UDC), kiu malgraŭ sia nomo reprezentas la plej konserveman kaj kontraŭenmigran movadon de Svislando, lanĉas tutkantonan referendumon por vere malpermesi almozadon en la tuta vaŭda kantono (1). *Opre Rrom* kontraŭstarados. La batalo viglados.

Nun onidiro regas inter romaoj, ke almozado estos malpermesita. *Véra* kontraŭstaras: «Ne ekzistas malpermeso!» Kaj ŝi donis al la ĉeestantaj romaoj rendezuon la postan tagon sur parkejo por tion pridiskuti. Ĉar la romaoj dormas en siaj aŭtomobiloj sur la parkejoj, ĉefe kiam fermitas la vintraj dormejoj proponataj dumvintre al senloĝejoj (6). Dormi en aŭtomobilo sur parkejo ne laŭleĝas, sed aliaj lokoj ne ekzistas. Tial dum la nokto la dormantaj familioj estas senĉese vekataj de policianoj, kiuj disdonas monpunojn. Monpunojn ili ne povas pagi kaj tial ofte tranoktas kelkajn tagojn en karcero. En kunveno de *Opre Rrom* laŭzana policisto, kiu parolas rumane kaj aparte respondecas pri la romaoj, respondis al propono doni lokon al la romaoj, kie ili povus leĝe tranokti en siaj veturiloj. Ne, ĉar la municipo timas faciligi la vivon de la almozantoj. Tio logus pli da romaoj veni Laŭzanen kaj kreus altirefikon. Jen la ĉefa argumento por rifuzi ĉian helpon flanke de la municipo. La helpoj estas do la tasko de la eta kaj juna asocio *Opre Rrom*. Al ĝi mankas laborfortoj, kaj tiuj kiuj plej engaĝiĝas en la akompano de la romaoj, *Yves Leresche* kaj *Véra Tchérémissinof*, estas ofte superŝutitaj de la ĉiutagaj kaj foje noktaj petoj. Sed ilia senlaca akompano ebligas tre utilajn rilatojn inter la romaaj familioj kaj la lokaj aŭtoritatoj. Ne malofte ili ludas la rolon de komunikfaciligantoj, kaj dank' al tiu akompano la almozuloj iom post iom lernas la lokajn kutimojn kaj regulojn.

*Véra Tchérémissinof*, psikopedagogino, antaŭ longe okupiĝadis pri indianoj en suda Ameriko kaj nun dediĉas siajn tutajn fortojn al la laŭzanaj romaoj kiel vera patrino, *Mama Véra*, vokata poŝtelefono eĉ dum la nokto, kiam la romaoj havas problemojn kun la policistoj. Kaj ne malofte ŝi ellitiĝas por iri diskuti kun la policistoj, foje akompanata de *Yves Leresche*. Ŝi ankaŭ kondukas gravedajn virinojn en la akuŝejan hospitalon por naski bebon, aŭ malsanajn plenkreskulojn kaj infanojn en la hospitalojn por solvi diversajn sanproblemojn. Kunlabore kun la asocio kiun ŝi kreis, ŝi senlace respondas gazetarajn artikolojn, alvokas koncernatajn asociojn kaj organizas gazetarajn konferencojn ktp.

Dum mi kuntenis la romaan standardon kun *Véra*, ŝi rimarkis: «nia manifestacio kunvenigas malmultajn homojn, la pasantaj piedirantoj zorge evitas nin, sed ni devas persiste plu informi, nur tiel ni havos rezultojn». Veras, ke malmultaj venis informiĝi al ni, kaj kiam *Michel*, kiu organizis la manifestacion, volis

doni flugfoliojn al du pasantaj virinoj, klarigante ke temas pri romaoj, tiuj ĉi streĉe respondis: «Certe ne!» La temo ja pasie emocias, kaj ne maloftas la parolaj agresoj kiam *Opre Rrom* ĉeestas la sabatajn bazarojn kun eta budo.

### EPILOGO

Tiun ĉi artikolon mi verkis printempe. Intertempe la limigaj reguloj de la socialisma registaro efektiviĝis en Laŭzano, kaj multaj romaaj familioj foriris en Francion aŭ en Svedion, kie ili renkontas similajn problemojn. Aliaj venis. Ili devas almozi je kvin metroj de butikaj kaj preĝejoj enirejoj, de bankaŭtomatoj ktp. La policistoj diverse interpretas la regulojn, komercistoj eĉ false proklamas, ke almozado estas malpermesita. Se policisto opinias, ke la reguloj ne estas respektataj, li konfiskas la tutan monon pene kolektitan surtroutare, kaj se romao ne pagis iun monpunon, li foje estas haltigata ĉe la landlimo, kiam li rehejmeniĝas, por pagi sian ŝuldon. *Opre Rrom* kolektas la evidentajn maljustaĵojn kaj ekigas procesojn. *Véra* kaj aliaj membroj de *Opre Rrom* plu konas la lokajn romaajn familiojn, ili same kiel la loka polico plu asertas, ke ne estas mafiaj retoj inter ili: «ja foje venis suspektinda familio, sed ĝi foriris». *Opre Rrom* plu helpas la romaojn trovi etajn laborojn kaj foje sukcesas, sed neceas krei fidon inter la loĝantoj kaj la laborpetantaj romaoj.

Kaj mi forgesis diri ion tute eksterteman: *Véra* tre ŝatas Esperanton kaj emociplene legis la libron pri *Zamenhof* de *Henri Masson*. Ŝia avo vivis en la bjalistoka geto, kie vivis ankaŭ *Zamenhof* **N M**

### Notoj:

(1) Laŭzano estas svisa urbo, franglingva, ĉe la Lemana lago, 60 kilometrojn de Ĝenevo. Ĝi estas la ĉefurbo de la Vaŭda kantono.

(2) “La romaa: la plej eŭropa lingvo el ĉiuj, sed tamen ...” Eŭropa Unio hieraŭ hodiaŭ morgaŭ. Lingvaj kaj kulturaj aspektoj. Referaĵoj kaj diskutintervenoj, Sarajevo, *elbih*, 2011.

(3) La sama kongreso konsilis la uzon de la vorto *romao* por kunaĵo de popoloj venintaj el Hindio, nomataj jen ciganoj, jen sintioj, manuŝoj kaj aliaj. Tiu kongreso kreis la Internacian Romaan Unuiĝon (*Romano Internacionalno Jekhetanipe*). Tiu tutmonda organizo ĝuas konsultajn rilatojn kun UNO kaj kun la Eŭropa Konsilio. Ĝia sidejo troviĝas en Prago.

(4) <http://www.oprerrom.org/>

(5) <http://www.esf.ch/leresche/>

(6) Notindas, ke tiuj ŝirmejoj ofte ne povas gastigi ĉiujn, kaj akceptas nur infanojn kaj virinojn aŭ maljunulojn. Ili kostas po CHF 5.00 por persono kaj nokto. Tio multas por almozantoj, kiuj enspezas meze inter CHF 10.00 kaj CHF 20.00 tage.

# LA ARBREŜOJ

## DUA PARTO LA DIASPORO

### LA DIASPORO: ĜENERALAJ KARAKTERIZAĴOJ

En la numero 91 de **Etnismo** mi detale rakontis la historion de Albanio ĝis la alveno de la turkoj por pli bone kompreni la kreon de la suditalaj albanaj kolonioj. Por tio mi tre larĝe inspiriĝis de CD-ROM, produktita de la provinco de Palermo, kiun ricevis la partoprenantoj de *Grundvitg*-staĝo okazinta kadre de la lastjara Itala Esperanto-Kongreso en *Mazara del Valo*. Tiu ĉi CD-ROM titoliĝas “*Gli Arbëreshë di Sicilia*” (la arbresĥoj de Sicilio), uzante la terminon – arbresĥo – donitan al tiu ĉi etna minoritato ekloĝinta en la sudo de Italio inter la 15-a kaj 18-a jarcentoj. En tiu ĉi dua parto mi ĉefe raportos pri la historia kunteksto de la albana ekloĝado en Sicilio



Pluraj faktoj instigis la albanojn al migrado Suditalien ekde la 13a ĝis la 18a jc. Sed la malfacilaj kondiĉoj ekonomiaj kaj sociaj, kiuj tiam regis en la sudaj regionoj de Italio, certe estis la precipa kialo. Fortan krizon kaŭzis la malkresko de agrikultura produktado, la forlaso de la kamparanaj centroj kaj la ĉiam pli altaj impostoj. Sekve al tio la loka ekonomio radikale transformiĝis kaj venis novaj loĝantoj en tiujn forlasitajn regionojn, inter kiuj albanoj.

La historiistoj nun certas, ke tiuj favoraj kondiĉoj instigis multajn albanajn grupojn trairi Adriatikon por kolonii la forlasitajn vilaĝojn de suda Italio. En Sicilio oni kalkulis, ke, antaŭ 1550, el ĉirkaŭ dekdu novaj kolonioj, ok estis albanaj. La situacio estis sama en Kalabrio, «malfortigita de la luktoj inter

aragonanoj kaj anĵuanoj, vigligataj de monavidaj baronoj agitemaj kaj ribelemaj en la lasta kvarono de la 15a jc». Kalabrio «montris signojn de civila kaj ekonomia dekadenco». Ĝi estis revivigita de la novaj albanaj laborfortoj. En Apulio la albanaj kolonioj estis favorataj per senimpostigo dum 10 jaroj, donita de la napolaj aŭtoritatoj. En Taranto formiĝis areo, nomata Taranta Albanio, kiu estis homogena teritorio kun samaj lingvo, tradicio, kutimoj kaj religio.

Tiuj novaj kolonioj kreiĝis ĝenerale post ricevo de jura permeso (*licentia populandi*), kiu difinis la rajtojn kaj la devojn de ambaŭ kontraktantaj partoj. Tiuj kontraktoj nun konstituas gravan dokumentaron por kompreni la sociajn kaj ekonomiajn kondiĉojn en kiuj naskiĝis kaj disvolviĝis tiuj kolonioj en la 14-a kaj 15-a jc.

Alia fakto certigita de la nuntempaj historiistoj estas, ke tiuj albanaj grupoj enmigrintaj en Kalabron kaj Sicilion, same kiel en aliajn regionojn, multe moviĝis de komunumo al alia, kreante tiel internan migradon, ĉu hazardan ĉu organizatan, kies realon kaj konsekvencojn ni nun malfacile povas mezuri. Tiuj moviĝoj ofte kreis novajn komunumojn, kiuj, eĉ se ni ne povas ligi ilin rekte al la albana enmigrado, rezultas el la tiama koloniiga politiko en suda Italio. Multaj el tiuj albanaj vilaĝoj ja ne estis propraj “fondaĵoj” sed pli ĝuste “refondaĵoj” surbaze de malnovaj kaj forlasitaj mezepokaj domaroj, kiuj dank’ al tiu reloĝado povis revivi ekonomie kaj formis kulturajn mediojn, kiuj diversis de la ĉirkaŭaj pro apartaj lingvo, religia rito, tradicio kaj kutimoj.

Tiuj komunumoj plej ofte kreiĝis en lokoj malfacile atingeblaj, ofte montaraj, sen iu ajn antaŭplanado, kiu ebligis socian organizon malsaman de la indiĝenaj. Tion montras ekzemple la nomoj de kvartaloj, raportitaj en antikvaj dokumentoj, kiuj respondas al la nomoj de la plej gravaj familioj, eble laŭ la modelo de similaj nomoj donitaj en Albanio.



**LA DIASPORO EKDE LA 13A ĜIS LA 15A JARCENTO**

La albana migrado al Italio okazis dum longa periodo kaj disvolviĝis laŭ variaj fazoj, karakterizitaj de diversaj historiaj eventoj (antaŭ ĉio militistaj sed ankaŭ politikaj-diplomataj, eknomiaj kaj kulturaj), en la balkana duonisulo antaŭ kaj post la longa turk-otomana okupacio ekde la 15a jc. Pro la vasteco geografia kaj tempa de la fenomeno la nunaj historiaj konoj ne sufiĉas por certigi la disvolviĝon de tiuj diversaj moviĝoj, iliajn realojn kaj dimensiojn. Limigante nin al la periodo ĵus antaŭ la vera formiĝo de la diasporo, tio estas fine de la 15a jc, ni baziĝas sur la arkivaj esploroj de la lastaj jardekoj.

La ĉeesto de sporadaj albanaj grupetoj, plej ofte familioj, originaj el la proksimeco de havenoj kiel *Durrësi* (Duraso) *Ulqini*, *Tivari*, deviga forirloko de la ĉefaj komercaj vojoj al Oriento, estas notata proksimume inter la fino de la 13a kaj la fino de la 14a jc en la marbordaj regionoj de centra kaj suda Italio kun disradioj al okcidenta Sicilio, kie la bezono de laborfortoj aparte gravis. Ili senprobleme estis dungitaj kiel taglaboristoj en farmoj (*jurnateri* kaj *zappaturi*) de la grandaj feŭdaj familioj. Aliajn similajn grupojn oni trovis en centoj da domaroj en la nord-oriento de Italio ekde Peskaro ĝis *Porto San Giorgio* kaj en la Apeninoj umbriaj kaj markiaj. Tiuj ĉi albanoj estis rapide asimilitaj kaj postlasis malmulte da informoj en la arkivoj.

Pli signifa estis la albana kolonio, kiu kreiĝis en la teritorioj de Venecio, kie ili estis bone akceptitaj kaj aparte kontribuis al la eŭropa Renesanca idearo kaj verkaro. Sed tiuj ĉi unuaj italaj enmigraĵoj de albanoj estis nur preludo al la granda fluo, kiu okazis kelkajn jardekojn poste, ĉirkaŭ la unua duono de la 15a jc en ĉiuj suditalaj regionoj.

**LA ELMIGRAĴOJ KOMENCE DE LA 15A JARCENTO**

La unuaj notindaj migradaj ondoj okazis dum la periodo kiam regis *Gjergj Kastrioti Skanderbeg* (1404-1468). Malgraŭ la necerteco kaj la kontraŭdiro de la fontoj oni povas konsideri, ke la 15a-jarcentaj albanaj migradoj okazis antaŭ kaj post la jaro 1468 (jaro de la morto de *Skanderbeg*) pro kaŭzoj diversaj laŭ la regionoj.

Oni distingas la migradojn okazintajn antaŭ 1468, kaŭzitajn ĉefe de militistaj moviĝoj, disde tiuj post la forpaso de *Skanderbeg*, kiam okazis amasaj fuĝoj kaŭze de la turka invado. La migradojn antaŭ 1468 oni kalkulas je tri.

La unuaj, inter 1440 kaj 1448, koncernas ĉefe militistojn, kies

helpo estis petata unue de Alfonso 5a de Aragono. Li petis la helpon de *Kastrioti* por repeli la atakojn de la anĵuanoj kaj subpremi ribelojn de kelkaj kalabraj baronoj aliancitaj al historiaj malamiko. En signo de amikeco kaj de rekompenco post la sukcesa helpo, Alfonso proponis al *Dhimitër Reres*, unu el la gvidantoj de tiuj albanaj skadroj, la gubernion de Kalabrio kaj al alia, *Gjergj*, filo de *Reres*, li petis restadi en Sicilio kun siaj trupoj por protekti la okcidentajn marbordojn kontraŭ la anĵuaj ekspedicioj. En Kalabrio la soldatoj de *Reres* fondis la supozeble plej antikvajn albanajn koloniojn en Italio, disajn en la teritorio de *Catanzaro*.

Alvenintaj en Sicilon en 1448, la albanaj soldatoj de la dua migrada ondo ŝajne ekloĝis en la antikva fortikaĵo de *Bizir* proksime al *Mazaro* kaj poste moviĝis orienten proksime de la forlasita kastelo *Calatamauro* kaj fine proksime al la vilaĝoj de *Contessa Entellina*, kie ili probable haltis por kelkaj jaroj, ĝis iuj forlasis la lokon por aliĝi al aliaj albanaj grupoj en Kalabrio aŭ por reiri Albanien. De *Contessa Entellina* kelkaj ankaŭ iris al *Mezzojuso* kaj al *Palazzo Adriano*, kie ili trovis forlasitajn domarojn por tie ekloĝi.

Ankaŭ la posteulo de Alfonso, kiu mortis en 1458, Ferdinando, petis la helpon de *Skanderbeg*. Unua albana ekspedicio okazis en Italio en 1460 fare de militistoj gvidataj de *Gjon Stres Balsha*, la nevo de *Skanderbeg*, kaj alia albana militista teamo. En aŭgusto 1461 la samaj revenis Italian, denove vokitaj de Ferdinando. Kaj sekve al tio novaj kolonioj de albanoj kreiĝis en Apulio kaj Moliso.

La tria albana transiro okazis en Sicilio en 1467. Grupo de albanaj nobeloj el la familio de *Skanderbeg* petis de *Giovanni de Aragona* la permeson ekloĝi



kun siaj familioj en la kolonioj jam ekzistantaj en la insulo. Dokumentoj citas iliajn petojn la 8an kaj 18an de oktobro 1467 kaj la pozitivan respondon de la aragona suvereno memore al la amikaj kaj fidelaj rilatoj ekzistantaj kun *Skanderbeg*. Tiuj nobeloj ekloĝis verŝajne en la arbreŝaj jam ekzistantaj kolonioj de *Contessa Entellina*, *Palazzo Adriano* kaj *Mezzojuso*.



Vikimedia. Aŭtoro: Lucadideo.

## LA DIASPORO

### UNUAPARTE

#### DE LA 15A JARCENTO

Tute aliaj kaj pli gravaj estis la sekvaj migradaj ondoj de albanoj, kiuj forlasis sian patrujon post la morto de *Skanderbeg*. Sed ankaŭ tie la dokumentoj malmultas koncerne la milojn da rifuĝintoj alvenintaj en Italion fine de la 15a jc kaj komence de la 16a. Sed ja la plua eniro de la turka armeo en Albanion kaj pli ĝenerale en Balkanion estis la ĉefa instigo transiri Adriatikon prefere al submetiĝo.

Ekde la jaro 1517 ĝis 1532-34 multaj albanaj familioj delonge loĝantaj en Grekio, interalie en Peloponezo, decidis migri Italien.

Sed pli multaj ankoraŭ estis la transportitoj de la ŝipoj de Karlo la 5a ekde la peleponezaj urboj Korono kaj Modono ĵus antaŭ ilia kapto fare de la turka armeo. Sicilia historiisto, *Tommaso Fazzello*, mencias la konkeron de Duraso kaj de la Peloponezo post tiu de Kostantinopolo, kiu alvenigis multajn grekojn en Sicilion. Li eĉ diras, ke ĉiuj "grekoj" de la urbo

**Rosciano estas arbreŝa komunumo en Villa Badessa, la sola el Abruco, kiu konservis sian lingvon kaj la riton bizancan.**

Korono fuĝis. Certe ankaŭ grekoj fuĝis, verŝajne de tiu tempo datiĝas la konfuzo inter albanoj kaj grekoj en la suditalaj kolonioj.

Fakte tiuj albanoj el Korono alvenis en plurajn jam ekzistantajn albanajn koloniojn en Kalabrio, Bazilikato kaj Sicilio kaj donis fortan impulson al la arbreŝa identeco etna, lingva kaj religia arbreŝa identeco.

La migrada fluo ne ĉesis dum la postaj jardekoj, sed ĝi neniam plu estis amasa. Arkivoj indikas, ke laŭlonge de la 17a jarcento daŭre grupetoj forlasis la albanan patrujon por restadi en la kolonioj jam formitaj far iliaj samnacionoj.

En 1744 densa grupo de albanoj ekloĝis en *Villa Badessa*, provinco de Peskaro. Tiu kolonio estas konsiderata kiel la albana kolonio fondita kiel la lasta en Italio.

**N M**

## ERRATUM

Tiuj subaj notoj devus aperi fine de la unua parto de la artikolo "La arbreŝoj de Sicilio" aperinta en *Etnismo* 91. Ni pardonpetas pro la malagrablaĵo. NdIR

Notoj:

<sup>1</sup> el la greka *Μολοσσοί*, *Molossoi*.

<sup>2</sup> La romia Imperio estis definitive duonigita en la jaro 395 en okcidenta kaj orienta parto. La okcidenta maleperis en 476 kaj la orienta iĝis la Bizanca Imperio.

<sup>3</sup> Frumezepoka popolo el kaŭkazaj regionoj, kiu ludis grandan rolojn en la 6-a kaj 9-a jc, konstruante imperion inter la Adriatiko kaj la Balta maro.

<sup>4</sup> **Skanderbeg, heroo de Albanujo.** Kompilis *Cuk Simoni*, 1929, 144 p. Historia verko pri la „savinto“ de la albanoj kontraŭ la turka invado en la 15-a jarcento. La unua Esperant-lingva verko aperinta en Albanio.

<sup>5</sup> Turka nomo por la kavaleriaj trupoj.

<sup>6</sup> El la antikva turka -beg-: sinjoro.

Alain Favre

## PATRIC, OKCITANA KANTISTO

**D**e pli ol kvardek jaroj *Patric* [Patrik'] kantas sur okcitanaj scenejoj kaj aperigis ĝis nun almenaŭ dudekon da diskoj (albumoj). Li havas fidelan publikon, kiu aprezas same liajn proprajn kanzonojn kiel la tradiciajn kantojn, kiujn li emas interpreti; li ankaŭ muzikigas konatajn poemojn malnovajn. Kun profunda sento pri melodio kaj "eterna ribelemo", li ĉefe inspiriĝas de siaj okcitanaj radikoj kaj kulturo (li fakte estas langvedokano) sed ankaŭ de aliaj sudeŭropaj tradicioj, katalunaj, napolaj, grekaj, eĉ argentinaj..., kio buntigas kaj vivigas liajn komponaĵojn. Lia samregionano *Georges Brassens*, fama franclingva kantaŭtoro, kiun li persone konis, tute ankaŭ lin influis.

Liaj unuaj kontaktoj kun la esperanta mondo tute okazis antaŭ multaj jaroj ĉar, en 1998, oni jam povis lin aŭskulti kadre de la UK en Montpeliero. Tiam *Ludmila Novikova*, el Ruslando, ekkonis tiun "veran magiiston de melodio" veran magiiston de melodio ». Sed nur longe poste, en 2011, kiam ŝi revidis lin en *Seta* (*Sète* en la franca, langvedoka havenurbo, kie jam okazis pluraj esperanto-aranĝoj), ŝi konkretigis sian planon traduki liajn kantojn al esperanto. Konante preskaŭ nenion pri la okcitana, ŝi sukcesis akiri la helpon de *André Andrieu* (Andreo Andrio) kaj de pluraj samlandaninoj kun konoj pri latinidaj lingvoj. Tiel aperis, ĉe la fama rusa eldonejo *Impeto*, 40-paĝa libreto, kiu enhavas la tradukon al esperanto de 25 kanzonoj, ofte kun klarigaj komentoj.

Sed plie kaj grave, *Patric* mem tuj poste reprenis 14 kantojn el tiu esperantigita serio (plus unu, kiun mi ne retrovis en la libreto) en nova CD, "*Patric Okcitanio*", eldonita de Vinilkosmo (2012). En ĝi troviĝas kelkaj liaj propraj kreaĵoj de "moderna trobadoro" kaj tradiciaj kantoj kiel ekzemple «La kaliko sankta / *Coupo santo*», poemo de *Mistral*, kiu muzikigita fariĝis la himno de Provenco, kaj la fama «Ĝi kantas / *Se canta*», himno de tuta Okcitanio. La tre danciga fina peco, "Farandolo de senmonuloj / *Farandolo des acabaires*", verŝajne ekzistas en pluraj kulturoj; en mia etna lingvo – la arpitana, tre proksima al la okcitana – mi konas de ĝi du tute malsamajn tekstajn versiojn.

Konklude, ne enirante pli detale en la kantojn, mi povas nur varme konsili tiun libron kaj la rilatan diskon, tiu ĉi registrita kun bona teknika nivelo, belaj aranĝoj (fluto, gitaro, klavaroj...), ankaŭ bona prononco de la lingvo, per trankvila voĉo. *Ludmila Novikova* vere trafe laboris, trovante la ĝustan ritmon



por la esperantaj tekstoj. Kaj la tradukoj estas bonkvalitaj: ne posedante la originajn versiojn de la kantoj, tion mi povis taksu per la reto, en kiu troveblas kelkaj videaĵoj de *Patric*. Mi eĉ bedaŭras la maleston de pluraj belaj pecoj, tradukitaj de *Ludmila* kaj ŝiaj kunlaborantoj sed ne elektitaj por tiu disko. Eble por venonta...


Verdire nedelonge mi scias pri *Patric*, sed ĉio tio donis al mi la emon akiri pliajn diskojn de tiu kantaŭtoro, kiu aldone agrable, "nature" scipovas vivi la tradicion. Tial mi donos ankaŭ la adreson de lia diskeldonejo, al kiu oni povas rekte mendi. **AF**

Noto: aliaj informoj pri *Patric* kaj liaj kantoj estas troveblaj en *Etnismo* 89, p. 2-5.

«Okcitanaj kantoj en Esperanto», eldonejo "Impeto", Moskvo, ISBN 978-5-7161-022, prezo 9 EUR, mendebla ĉe Vinilkosmo

«Patric Okcitanio», Vinilkosmo VKDD 113-045, prezo 18,00 EUR

Aura – Occitania Productions <http://www.aura-occitania.com/aura.php>



**Ludmila Novikova kun Patric, foto el la malantaŭa parto de la diska kovrilpaĝo.**

## KONCIZE EL ...

**Francio. – Ĉu finfine ratifo de la Ĉarto pri regionaj aŭ minoritataj lingvoj?** Adoptita de la Eŭropa Konsilio en 1992, subskribita de Francio en 1999, tiu fama ĉarto ankoraŭ ne estis ratifita de ŝtato, kiu nemalofte pretendas esti «patrio de la homaj rajtoj». En la elektoprogramo de la prezidenta kandidato *François Hollande* ja troviĝis tiu ratifo, sed lastprintempe la sama homo, jam elektita ŝtatprezidento, aplombis aserti, ke li ne plenumos tiun promeson... Kaj subite, en decembro 2013, la ĉefministro *Jean-Marc Ayrault* deklaris dum vizito en Bretonio – kiu lastatempe konis sufiĉe fortan agitiĝon pro impostaj kaj senlaborecaj kialoj – ke la registaro volas akceli la ratifon de la ĉarto. Debato malfermiĝos en la nacia asembleo (deputitaro) jam la 20an de januaro. Tiu neatendita anonco surprizis ĉiujn, kaj tuj la plej ekstremaj jakobenoj (tio estas centralizemuloj), ekzemple la *Parti de gauche* (maldekstra partio), klare kaj malestime esprimis sian kontraŭstaron. Oni povas ankaŭ supozi, ke plej granda parto de la opozicio (ĉefe UMP, dekstra partio) principe rifuzos tiun ratifon. Sed kia okazaĵo klarigas, ke la ĉefministro abrupte faris tian elpaŝon? Fakte Francio iĝas pli kaj pli minoritata, eĉ izolita en Eŭropo pri tiu temo; ĵusa raporto de la Eŭropa Parlamento, prezentita de la korsika deputito *François Alfonsi*, petas interalie, ke ĉiuj ŝtatoj, kiuj tion ankoraŭ ne faris, subkribu kaj ratifu tiun ĉarton. Kaj la raporto estis akceptita per 645 voĉoj el la 700 eblaj! Ĉu do tiu deklaro de la franca registaro estas simpla manovro kaj lavado de manoj kun la celo, ke la parlamento finfine rifuzu? Tio eblas, tiom pli, ke la ratifo povus postuli ŝanĝon en la konstitucio mem, kio implicas interkonsenton de la «kongreso» - tio estas de ambaŭ ĉambroj kunigitaj (nacia asembleo kaj senato) - tre malfacile atingeblan. Tamen grava pordo finfine malfermiĝis, kaj la batalantoj por la minoritataj lingvoj espereble scipovos plej efike uzi tiun historian oportunon.

A. Favre

**Svislando. - La arpitana en la Ĉarton:** male al Francio ekzemple, Svislando ja ratifis la Eŭropan Ĉarton de la regionaj aŭ minoritataj lingvoj kun mencio de la romanĉa, de la itala, de la jeniŝa kaj de la jida. Ĝi tamen ne menciis la francprovencan aŭ arpitanan (1) lingvon. Estas konate, ke la Ĉarto protektas nur lingvojn, ne dialektojn de ŝtata lingvo. Kaj ĝis antaŭ nelonge la diversaj variantaj de la francprovenca parolataj en Romandio (nun franclingva Svislando) estis nomataj nur per la franca vorto *patois*, kaj plej multaj politikistoj opiniis kaj plu opinias, ke ĝi estas dialekto de la franca. Antaŭ malpli ol 10 jaroj, la tiama prezidanto de la Konfederacio, *Pascal Couchepin*, kiu vivas en la

valeza kantono, kie la francprovenca estas plej vigla, letere respondis, ke ne eblas menciigi ĝin en la Ĉarto, ĉar ĝi estas dialekto de la franca. Sed nun ĉiuj lingvistoj konsentas pri la malkovro de la itala lingvisto *Graziadio Isaia Ascoli* fine de la 19a jarcento koncerne la fortan komunecon de la variantoj parolataj interalie en Romandio, en Savojo kaj en Aosta Valo kaj rekonas, ke la francprovenca estas aŭtonoma lingvo ekde la 7a jc paralele kun la okcitana kaj la ojla variantoj, el kiuj venas la franca. Tial *Claudine Brohy*, lingvistino kaj svisa eksperto por la Ĉarto, iniciatis rekonon de la arpitana. Ŝi invitis kelkajn parolantojn de tiu lingvo al la Kultura Departemento en Berno por dialogi kun aliaj eŭropaj ekspertoj. En la Ĉarto la ratifantaj landoj elektas diversajn punktojn por konkretigi sian subtenon al la koncernataj lingvoj, kies plenumado devas esti ĉiujare kontrolata de ekspertoj, kiuj redaktas raporton. En la raporto de la jaro 2013 la eŭropaj ekspertoj instigas la svisajn aŭtoritatojn ekzameni kune kun la koncernataj kantonaj aŭtoritatoj kaj la parolantoj de la francprovenca, ĉu tiu lingvo ja estas minoritata lingvo laŭ la priskribo de la ĉapitro 1 de la Ĉarto. Tiu preskaŭ ne atendita oportuno estas granda ŝanco por la arpitana en Svislando, sed ĉu la parolantoj de tiu lingvo kapablos sufiĉe engaĝiĝi por konigi sian lingvon al la publiko, al la gazetaro kaj al la politikistoj? Ne certas. Oni povas efektive observi iun fermiĝon en si mem de kelkaj arpitanaj medioj en Svislando, en kiuj la homoj preferus, ke ilia *patois* restu tiu pitoreska vilaĝa lingvo de la pasinteco ol estu vere rekonata lingvo, eĉ se minoritata.

Du aliaj ŝtatoj estas koncernataj de la arpitana lingvo, Italio kaj Francio. La unua jam rekonis la francprovencan kaj ĝin finance kaj politike subtenas, sed ĝi ankoraŭ ne ratifis la Ĉarton, dum Francio rekomencas pensi pri ratifo de tiu Eŭropa ĉarto (vidu samrubrikan artikolon de A. Favre). Sed ne certas, ke Francio mencias la arpitanan en ĝia rekono (2). Tamen se unu el tiuj tri ŝtatoj menciis la francprovencan/arpitanan ratifante la Ĉarton, tio kreus bonvenan elanon por la du aliaj kaj grandan paŝon antaŭen por la arpitana.

N. Margot

Noto:

(1) Al la unue uzita nomo *francprovenca*, donita de G.I. Ascoli en 1873, kiu kreas konfuzon kun la provenca, dialekto de la okcitana, aldoniĝis la pli klara nomo *arpitana*, kiu pli kaj pli uziĝas. Mi uzas egale ambaŭ.

(2) En Francio la francprovenca estas plene agnoskita de la ministerio pri kulturo, sed tiu pri edukado rifuzas ĝis nun konsideri tiun lingvon kiel temon por abiturienta ekzameno... kvankam ĝi financas kursojn. Krome la administra regiono Rodano-Alpoj plene agnoskas la francprovencan, samnivele kiel la okcitanan.



- INFORMILO 72  
Internacia komitato por Etnaj  
Liberecoj,  
Honora prezidanto:  
Uwe Joachim Moritz

## 98-A UNIVERSALA KONGRESO DE UEA

IKEL montriĝis ĉefe en 3 okazoj dum la 98-a UK en Rejkjaviko:

- **Sabate la 20an de julio: Movada Foiro:** ni kundividis etan tablon kun la Kultura Centro Kvinpetalo en Bouresse. Eblis montri kaj vendi numerojn de *Etnismo* kaj informi pri IKEL. Ni ankaŭ povis informi pri la du kunvenoj de IKEL dum UK, ĉar kiel kutime la kongreslibro nur tre koncize informas pri la kunvenoj kun dufoje nur la nomo -etnistoj-.

- **Marde la 23an de julio 2013:** niaj du kunvenoj okazis samtage je sinsekvaj horoj en salono iom tro granda ĉefe por la membrokunveno, kiu arigis 7 personojn, krom la du estraranoj, inter kiuj 5 estis IKEL-membroj. Efektive kelkaj aliaj IKEL-membroj ekskursis tiun ĉi tagon aŭ devis ĉeesti samtempan kunvenon (prezento de la nova estraro de UEA).

**Membrokunveno:** La proponita tagordo estis modifita ĉar fakte tiun ĉi jaron ne nur necesis ratifi la elekton de la prezidanto, *Alain Favre*, sed reelekti la estraranojn, kiuj reprezentiĝis. Ili ĉiuj estis unuanime elektitaj.

**Faka kunveno:** sekvis la faka kunveno kun la prelego de *Ed Robertson*: “Kio okazas en Skotlando?”. Inter 30 kaj 50 personoj ĉeestis tiun tre interesan prelegon, kies teksto aperas en tiu ĉi numero de *Etnismo*.

## NOVA KASISTO EN IKEL

En la lasta numero ni anoncis la demision de la kasisto, *Llibert Puig*, kaj tiam serĉis novan kandidaton «por ke *Etnismo* povu pli aperi». Ni ĝojas povi anonci, ke niaj tiamaj zorgoj malaperis dank'al la propono de nia estrarano *Xabier Iturriotz* repreni la taskon de kasisto. Multajn dankojn al *Xabi* kaj niaj bondezirojn por lia laboro, kiu komenciĝas en 2014.

## SENDOSERVO

Ĝis 2012 kason kaj sendoservon samtempe prizorgis *Llibert Puig*, kiu presigis kaj sendis la gazetojn kun la helpo de sia filo *Hèctor Puig*, kiun ni dankas pro lia helpo pretigi la dosierojn de *Etnismo* por la presejo. La numeroj de 2013 estis provizore presitaj kaj senditaj en Svislando. Tio ne povas daŭri kaj tuj post la sendo de tiu ĉi numero ni serĉos alian solvon.

## 36A KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO + 1A OKCITANA KONGRESO DE ESPERANTO EN SALARDÚ

IKEL estis kunorganizanto de tiu kongreso kaj kvar el ties membroj, *Xabier Iturriotz*, *Nikolas Xil Carvalho*, *Rafael Blanco* kaj *Kevin de Laet* prelegis. La kongreso estis ege interesa, ĉefe por etnistoj ĉar ĝi okazis en la Aran-valo, sola loko, kie la okcitana oficialas (krom Piemonto), sed ankaŭ ĉar multaj prelegoj kaj diskutoj koncernis etnistajn temojn.

Ni organizis ne formalan IKEL-kunvenon en kiu ĉeestis 12 personoj. Post prezento de la estraro, letero de la prezidanto, *Alain Favre*, kiu ne povis ĉeesti pro profesiaj kialoj, estis legata. Li komparis la nunajn etnajn malfacilaĵojn ene de la hispana kaj franca ŝtatoj, akiritajn de la nuntempaj ekonomiaj problemoj de Eŭropo, problemoj kiuj pli malpli rekte kondukas al politikaj pozicioj memorigantaj la jarojn 30ajn de la 20a jarcento. Li menciis sian arpitatan apartenon kundividitan kun la vicprezidentino. Tiu lingvo aparte parenkas la katalunan kaj la okcitanan.

*Alain Favre* rimarkigis, ke la membrokunvenoj okazas normale en la Universalaj Kongresoj, kiuj ne kunvenigas multajn IKEL-membrojn, tial estus pli bone ilin okazigi dum Katalunaj kongresoj, ĉar IKEL naskiĝis en Katalunio, multaj membroj venas el tiu regiono kaj el la apuda, la eŭska.

Ni festis nian demisiantan kasiston, *Llibert Puig*, jam membro de la estraro kiam IKEL estis fondita. Kun multe da entuziasmo kaj humuro li rakontis la naskiĝon de IKEL, kiam la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj kulturoj (AIDMLK), dum sia kongreso en Barcelono, kaj malgraŭ sia esperanto-nomo, rifuzis uzi la internacian lingvon almenaŭ por parto de sia programo. *Uwe J. Moritz* samtage decidis fondi IKEL kaj dumnokte verkis statuton. Alia atestanto de tiu naskiĝo, *Sebastià Ribes*, ĉeestis la kunvenon. Li estis la titoldesegnanto de la tiam gazeto *Etnismo*.

Ni ankaŭ diskutis pri la nuntempo kaj estonteco de IKEL. Revenis la ideo, ke oni intervenu ĉe ŝtataj estraroj, kiuj ne respektas la rajtojn de minoritataj etnoj. La lasta tia estis la interveno de *Daniele Vitali* ĉe UNIKODO por ke la litertipoj de la rufederaciaj lingvoj povu esti uzataj. La rezulton oni ne konas. Mankas laborforto nun pri similaj agadoj, sed oni devas pripensi la aferon.


**La Informaj flugfolioj** devus esti tradukitaj en diversajn lingvojn, minoritatajn aŭ ne

**La retejo** estas nun aktualigata, tamen ne sufiĉe disvolvigata. La problemoj estas, ke tiu retejo estas sufiĉe malfacile prilaborebla, kaj ke iu kompetentulo devus trovi retejon pli facile organizeblan. Nun *Alain Favre* zorgas pri ĝi, sed se iu kompetentulo volus pli bone prizorgi la aferon, tio bonvenus.

AF kaj NM



Pagita reklamo:



Kovrilpaĝo: Claude Roux

Originala titolo:

## DES VILLES POUR CHANGER LE MONDE

© atlantica, Biarritz, 2005

El la franca tradukis:

Marie-Thérèse Lloancy

Reviziis:

Christian Rivière

*André Cazetien*

### URBOJ POR ŜANĜI LA MONDON

Por ŝanĝi la Mondon, necesus ekpreni la politikan povon. Jes ja! la plej proksiman povon. Tiun de la komunumoj, pli precize tiun de la urboj el kiuj ege plejmulte venas deputitoj, estontaj ministroj, registarestroj, regantoj naciaj, eŭropaj, interkontinentaj, kiuj politikas por la nacioj kaj por la Mondo.

La eksterordinara aventuro de la urbo Mourenx, unua nova urbo en Francio, urbo laboratorio laŭ la filozofo Henri Lefebvre, ebligas nutri tiun revon.

*André Cazetien naskiĝis en 1923 en la bearna vilaĝeto Maslacq, inter Pau kaj Orthez.*

*Post la milito, li ricevis postenon de elementlerneja instruisto en Lacq, kies aventuron li intense travivis, poste en Mourenx, kies urbestro li fariĝis, kaj plu estis dek ok jarojn. Aparte ion li priĉfieras: li faris Nelson Mandela-n, tiam ankoraŭ en karcero, honora civitano de tiu novema urbo.*

Achevé d'imprimer

sur les presses d'ICN

64000 Orthez

*Cité du livre*

ISBN : 978-2-35519-109-1



Prezo: € 15.00

(1 sendokosto)

MENDEBLA DE:

mlloancy@laposte.net